



1-90*136*

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

ÚPLNÁ UČEBNICE

mezinárodní řeči dra. Esperanta.

Napsal Fr. VI. L.



PLENA LERNOLIBRO

de la lingvo internacia de dro. Esperanto.

Por Bohemoj skribis


Fr. VI. L.

V PARDUBICÍCH.

Tiskem firmy F. Hoblík. — Nákladem vlastním.

1890.

ALVOKO



La 1-an de junio 1914 oni inaŭguris en Františkovy Lázně, okaze de la 4-a Tut-aŭstria Esperanto-Kongreso, la unuan en la mondo grandan monumenton omaĝe al L. L. Zamenhof. Iniciatis ĝin la bavara fervojisto kaj loka Esperanto-klubestro Jacob Hechtel, kiu per monkollekto havigis la necesan sumon. La monumento estis kvarpilastra bloko el artefarita ŝtono, portanta supre bronzan reliefon de L. L. Zamenhof kun surskribo: Dro Zamenhof, aŭtoro de Esperanto - Per Esperanto al Paco, Harmonio, Laboro kaj Dio!

En 1938 nazioj komplete detruis la monumenton. Ĉeĥa Esperanto-Asocio opinias sia morala deo renovigi tiun ĉi historiaĵon. Por povi plenumi tion, ĈEA kunlabore kun UEA anoncas internacian monkollekton. Donacinto de almenaŭ 40 gld. aŭ 200 Kčs ricevos dankdiplomon, kiu donacos 400 gld. aŭ minimume 2000 Kčs ricevos medalon kun gravurita dankesprimon, kaj kiu donacos 5000 gld. aŭ 25000 Kčs, ties nomo estos gravurita sur la monumento. Kiu donacos la plej grandan sumon, ricevos miniaturan muldaĵon de la monumento. Kontribuon bonvolu sendi al ĈEA, banka konto 3330-021, var. simbolo 789.15.

La inaŭguro de la malnov-nova monumento oni planas por la jaro 1992, por kiu ĈEA jam proponis Pragon kiel kongresurbon por la 77-a UK. Dum tiu jaro oni festos la 400-an naskigdatrevenon de la ĉeĥa elstarulo - ofte nomata "Instruisto de la Nacioj" Jan Amos Komenský-Komenio, kiu la esperantistoj prave konsideras prapatro de la internacia lingvo.

Laŭ proponskizo de la akademia skulptisto Jiří Hrabě la dimensioj de la nova monumento estos iom reduktitaj kompare kun la origina kaj ĝi estos muldita el bronzo kaj fiksita en poluritan artefaritan ŝtonon, alta ĉ. 2,20 m.

P. Chrdle

DONACINTOJ POR LA MONUMENTO

43.	Ludmila Prokopová, Praha	200,-
44.	Jan Vainer, Hrádek u Rokycan	200,-
45.	Karel Brůna, Praha	200,-
46.	Dr. Marie Urxová, Praha	100,-
47.	Helena Štruncová, Praha	200,-
48.	Zdeněk Kynčl, Vrchlabí	200,-
49.	Marie Skařupová, Ostrava-Poruba	200,-
50.	František Janouch, Rumburk	200,-
51.	Jiří Hrabě, Praha	55 000,-
52.	Antonín Podhráský, Praha	250,-
53.	Miloslava Mášová, Slavičín	50,-
54.	Ing. Ladislav Kovář, Česká Třebová	50,-
55.	Anna Malinová, Okrouhlice	200,-
56.	Stanislav Čech, Dubňany	100,-
57.	Beatis Pínová, Praha	200,-
58.	IRE Dukla, Pardubice	1 000,-
59.	Zdena Dušková, Písek	30,-
60.	M. Jamborová, Chomutov	30,-
61.	Stanislav Linhart, Pardubice	600,-
62.	Esperanto Kolín	300,-
63.	Esperanto-rondeto Páco, Příbram	86,-
64.	Jan Blažek, Strakonice	50,-
65.	Miroslav Majerský, Nové Město n. M.	60,-
66.	Adolf Bartošík, Praha	500,-
67.	Esperantistoj - invalidoj, Slaný	580,-
68.	Vítězslav Gabák, Vrbno pod Pradědem	50,-
69.	Jiří Vevera, Nejděk	200,-
70.	Vojtěch Trojan, Žacléř	80,-
71.	František Brandejs, Praha	50,-
72.	Grupo Barbuloj	1 000,-
73.	František Valačky, Štěpánov n. Svatkou	200,-
74.	Ing. Roman Branberger, Praha	200,-
75.	Anna Mrázová, Rokycany	500,-
76.	Angela Böde, GDR	50,-
77.	Esperanto-rondeto, Turnov	200,-
78.	Esperanto-rondeto, Hranice	250,-
79.	SBČS, Nový Bor	50,-
80.	Alena Temelová, Benešov u Prahy	100,-
81.	Petr Engen, Norvegio	50,-
82.	Martin Stuppig, Aŭstrio	500,-
83.	Olsen E. Henning, Danio	200,-
84.	Hange Henning, Danio	200,-

(Daŭrigota)

Cent jaroj de la unua lernolibro por Ĉeĥoj

En la jaro 1987 ni festis cent jarojn de Esperanto. En la jaro 1989 ni eniris en la centan jaron de la Internacia Lingvo Esperanto en nia lando kaj en la jaro 1990 pasas jam unu jarcento de la unua lernolibro de Esperanto por ĉeĥoj. Verkis ĝin studento František Vladimír Lorenc.

Lorenc estis eminenta gimnaziano, talenta pri lingvoj. En la jaro 1887, estante nur 15-jara, li ellernis volapukon (Volapük) kaj instruis ĝin en Politika laborista klubo en Prago, en Pětrossova strato. Pro ciklo de traduk-poemoj de Lorenc en volapuko (i.a. el Rukopis zelenohorský - Manuskripto de Zelená Hora) la aŭtoro de volapuko J. M. Schleyer honoris lin per diplomo "Poedan" (Poeto volapuka).

Dum la jaro 1889 Lorenc tiam 17-jara renkontiĝis kum Esperanto kaj tuj ĝin trastudis, sciante tiutempe jam plurajn lingvojn, inkluzive orientajn. Ekkoninte la valoron de la nova lingvo li tuj cesis instrui volapukon, ekprelegis pri la Internacia Lingvo de d-ro Esperanto kaj komencis verki ĝian lernolibron, la unuan en la ĉeĥa lingvo.

Jam en 1890 Lorenc eldonis la verkon proprakoste en Pardubice. Sur la titoloĝo oni legas: Úplná učebnice mezinárodní řeči dra. Esperanta. Napsal Fr.Vl.L. Plena lernolibro de la lingvo internacia de dro. Esperanto. Por Bohemoj skribis Fr.Vl.L. V Pardubicích. Tiskem firmy F. Holbík. - Nákladem vlastním. 1890.

La 27-paĝa libreto enhavas dupaĝan Předmluva kaj Antaŭparolo-n, en kiuj li ankoraŭ montras la mankojn de volapuko; ilin sekvas 5-paĝa Úplná mluvnice - Plena gramatiko, 6-paĝa "Lekturo" (t.e. legaĵoj) kaj 10-paĝa Vortareto - Slovníček. En la libreto troviĝas jenaj versoj:

La libro de 1' naturo (Boleslav Jablonský)

Ho, mia kor'! (D-ro Zamenhof)

Kie patruj', mia patruj'? (Kde domov můj? Bohema kanto nacia)

La vero (Ján Kollár)

La ĉeĥajn versojn tradukis F. V. L. Ili estas la unuaj tradukoj el la ĉeĥa literaturo en Esperanton.

Krome troviĝas tie ok mallongaj prozaĵ tekstoj kaj unu dupaĝa: "L' azenoreloj", kiun rakontas F. V. L.

x x x

Forte dezirante ne militservi en la aŭstria imperiestra armeo, Lorenc elmigris en 1893, kun alies dokumentoj, en Brazilon, kie, travivinte nefacilan vivon komence, li fariĝis sub la adaptita nomo Francisco Valdomiro Lorenz elstara persono de la brazila kulturo. Listo de liaj verkoj enhavas 83 titolojn, kelkaj lokaj kluboj kaj unu eldonejo portas epiteto lian nomon. Vivofine li sciis 104 (!) lingvojn, kion atestas la verko de F. X. Xavier "O Esperanto como revelação - Esperanto kiel

revelacio" (Araras, 1976, 159 p. plus foto-aldoj pri Lorenz, filoj, gepatroj, naskiĝvilo Zbislav - nun Zbyslav k.a.). La mirindan poliglotecon de Lorenz dokumentas i.a. lia postmorte eldonita (1983) verko "La brazilaj Aruakoj" en Brasilia, kum multlingva kompara terminaro en lingvoj indianaĵ, europaj kaj aziaj.

La unua ĉeĥa esperantisto fariĝis la unua propagandanto de Esperanto en la "virga" Brazilo.

x x x

Estas aldoninde, ke en la j. 1901 estis fondita la unua klubo (Brno) en nia lando, en 1907 la unua landa asocio Unie českých esperantistů - Bohema Unio Esperantista kaj pasintjare pasis 80 jaroj post la unua landa Esperanto-kongreso (Praha, 1909, salutita de Zamenhof).

Referencoj: "Esperantista", Praha, 1947,7; "Starto", 1984,2; 1974,8; 1975,1; 1977,4-5; gaz. "Samostatnost", Praha, 1935 ("Mé vzpomínky" - Lorenc).

Festotagoj omaĝe al la 20-a datreveno de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

En la tagoj 25-a - 27-a de aŭgusto 1989 Ĉeĥa Esperanto-Asocio festis sian dudekjarigon en la urbo Havířov. La solenaĵon partoprenis 250 gesamideanoj, inter ili la eksterlandaj el Aŭstrio, Bulgario, Japanio, Jugoslavio, Hungario, GDR, FRG, Pollando, Sovetunio kaj gastoj el nia frata SEA.

Per sia ĉeesto honorigis niajn Festotagojn vicprezidanto de UEA, s-ano mag. Dobrzyński, s-ano prof. Yošimi Umeda, prezidanto de IFEF s-ano Giesener kaj multaj pliaj oficialaj gastoj, inkluzive de urbaj kaj partiaj funkciulcĵ.

La unuan festotagon okazis inaŭguro de la ekspozicio pri Esperanto, kium la saman tagon vespere montris la TV-programo. Post la inaŭguro de la ekspozicio oni akceptis la gvidantaron de ĈEA kaj honorajn eksterlandajn gastojn en la urbodomo. Posttagmeze prezentis s-ano M. Henke el Lódzo, Pollando, la teatraĵon "La brava soldato Ŝvejk" antaŭ plenplena salonego kaj rikoltis grandan aplaudon.

La Interkona Vespere estis ornamita, krom bela dancmuziko, ankaŭ per amuza programo. Tre plaĉis la moda parado.

Sabate la 26-an de aŭgusto la prezidanto de ĈEA s-ano Ing. Chrdle, CSc., inaŭguris la solenan kunsidon. Post la prelego estis transdonitaj diplomoj kaj nomumitaj honoraj anoj de la Asocio. Fine de la kunsido oni premiere projekciis la filmon "Esperanto signifas esperon", kiun kreis "Kurta filmo de Prago".

Posttagmeze la partoprenantoj guis la eminentan prelegon kun diapositivoj, fare de s-ano Umeda, pri la E-movado en Azio, kiun li gvidas. Mi certe ne troigas asertante, ke tiu ĉi japana samideano fariĝis karulo de ĉiuj. Poste sekvis altnivela kultura programo, en kiu prezentis sian arton niaj karaj kaj eminentaj operkantistoj s-ano Smyčka kaj s-ano Vích. Ankaŭ sinjorino Farná, operkantistino el Ostrava, regalis nin per sia najtingala soprano. Per piano akompanis la gekantistojn s-ino Bilanová el Haviřov kaj s-ano Vychodil, kiu koncertis ankaŭ kiel bonega solisto. La kanthoro "Muzilo" el Pollando prezentis al ni kaj polajn, kaj ĉeĥajn kantojn kaj multe placiis al ĉiuj. Ankaŭ s-ano Henke el Lodzo kontribuis per sia arta deklamo kaj nia kara Eva Seemannová karesis niajn orelojn per sia nekredeble carma Esperanto.

La amuzan vesperon ornamis la urbaj rondetoj de hobia agado ĉe la Domo de Kulturo en Haviřov, per diversaj prezentadoj. Eĉ tombolo ne mankis kaj oni dancis ĝis malfrua horo.

La 27-an, dimanĉe, okazis diskuto kaj kunsidoj de kelkaj sekcioj de ĈEA kaj poste la fermo. Por la ekskursemaj oni aranĝis trarigardon de la urbo kaj lunde la ekskurson en la ĉirkaŭaĵon.

Entute oni povas paroli pri tre sukcesa evento, ne nur pro la ĉeesto de tiom elstaraj personoj kaj la artnivela programo, ĉar ankaŭ la urbo meritas mencioni. Ĝi estas moderna, belaspekta, dronanta en verdaĵo, ĉirkaŭita per arbaroj, plena de parkoj, floroj kaj arboj. Ĉiuflake juna, ĉar konstruita dum nuraj 3 jaroj kaj aĝa 34 jarojn, dum la enloĝantoj estas average 32-jaraj kaj la Esperanto-rondeto en Haviřov, kiu tiel eminente preparis niajn belajn tagojn, estis fondita antaŭ 33 jaroj. Danke al ili ni logis tre komforte, ni kunvenadis en luksa Socia Domo, la artajn programojn ni spektis en impona salonego de la Kultura Domo de Leoš Janáček kaj en tiu de Petr Bezruč estis je nia dispono sufiĉe da konvenaj ejoj por kunsidoj de la sekcioj. Pretece oni aranĝis por ni la vidbendan projekciadon de la afable donacita fama kolora filmo pri Esperanto de s-ano Dobrzyński, kiu estas ĝia aŭtoro, kaj de la TV-filmo pri nia evento, projekciita en TV pasintan vesperon.

La urba poŝto uzis porokazan poststampilon, la radio kaj TV informis dufoje, ankaŭ la gazetoj ne pretervidis nian solenaĵon.

Mi konstatas, kaj tutcerte same la ceteraj, ke niaj Festotagoj apartenas al tiuj travivaĵoj, kiujn ni plezure rememoros.

Ni do estu dankemaj al Haviřov, ties afablaj urbanoj kaj la oferemaj gesamideanoj el ties E-rondeto.

Helena Štruncová



Prof. Y. Umeda aplaŭdigis ĉiujn partoprenantojn de la Festotagoj en Haviřov



Prezidanto de ĈEA Ing. Chrdle gratulas al s-ano A. Staňura, nova honora membro de ĈEA



Rekomendoj de la 22a konsultigo

de SLEAJ

La Konsultigo rekomendas al

- 1a la Esperanto-organizaĵoj subteni morale kaj finance la novkonstruon de la Zamenhof-monumento unua en la mondo en Františkovy Lázně, ĈSSR.
- 2a al la reprezentantoj de HEA kunlabore kun reprezentantoj de SLEAJ trakti pri mildigo de transpagaj problemoj kun la respondeculoj de UEA-Estraro kaj tiu de Centra Oficejo.
- 3a al la Esperanto-organizaĵoj en socialismaĵ landoj intense okupiĝi pri la regula kunlaboro kun la kooperativaj organizaĵoj.
- 4a al la esperantistoj laborantaj en kooperativoj kaj en entreprenoj ke ili publikigu siajn adresojn en Budapeŝta Informilo, por fondi la bazon de rektaj ekonomiaj kaj sociaj kontaktoj inter la diversaj entreprenoj por oficiala uzado de Esperanto.
- 5a al la esperantistoj pli atenti ekologiajn problemojn laŭ la iniciatoj de UEA-komitato kaj kunlabori pere de fondotaj eko-sekcioj kun neesperantistoj en la naturprotektaj agadoj kaj konsideri en sia laboro la aldonitan "Ekologian Rezolucion".
- 6a al la esperanto-organizaĵoj en socialismaĵ landoj subteni la eldonadon de Budapeŝta Informilo dusemajne, per propagando kaj per varbado de abonantoj.
- 7a SLEAJ analizu la agadon de MEM, ellaboru proponojn pri renovigo kaj pliefikigo de laboro de MEM kaj sendu ilin ĝis la fino de septembro 1989 al la prezidanto de MEM kaj kopie al la ceteraj SLEAJ. Prezidanto de MEM klopodu pritrakti la sumigitan projekton kun la respondeculoj dum la venonta renkontigo en Pardu-bice.
- 8a al la reprezentanto de HEA kompletigi la "Aktualan rekomendaron" per la rekomendoj de la 22a Konsultigo kaj la "baza dokumento de Konsultigo"-n per la adresoj de nove fonditaj landaj esperanto-asocioj.
- 9a fondi la Internacian Kunordigan Komitaton de Interlingvistoj /IKKI/, kun la celoj servi al reciproka informado de interlingvistoj pri far/i/a/o/taj esploroj; ellabori komunan planon de tiaj esploroj, speciale en leksikografia, historiografia, bibliografia, informpera branĉoj; kontribui al evoluigo de tiaj esploroj, speciale en la landoj, kie interlingvistoj ankoraŭ ne ricevis profesion bazon.
- 10a subteni la ideon aperigi ĉiumonatan varianton de "Moskvaj novaĵoj" en E-o, publikigi recenzojn pri la provnumero en la asociaj periodaĵoj kaj direkti antaŭmendojn al la redakcio.
- 11a al la landaj asocioj aparte trakti kun KEA kaj kun la LKK por ebligi partoprenon de siaj membroj en la 75a UK kaj 46a IJK kaj pri eventualaj kontribuoj al la programo.
- 12a SLEAJ laŭ sia ebleco arangu jubileon de prezidanto Ho Chi Minh /5/1990/, alvoku ĉiujn geesperantistojn sendi pri li artikolojn, librojn kaj similaĵojn /pere de VPEA/ al la Muzeo pri Ho Chi Minh en Hanojo.
- 13a SLEAJ kontakti siajn ŝtatajn entreprenojn pri eksporto de presaj eksterlandaj kaj proponi siajn esp. periodaĵojn por la abonkatalogo 1990 en la unuopaj landoj.

Kompilis: Oszkár Princz, gvidanto de la komisiono pri rekomendoj

La 74-a Universala Kongreso de Esperanto en Brajtono

En la tagoj de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1989 okazis en la brita banurbo Brajtono la 74-a UK, kiun partoprenis 2300 geesperantistoj el 50 landoj kaj 5 kontinentoj.

En la solena malfermo de la Kongreso oni aŭskultis la salutajn mesaĝojn de la Alta Protektanto, la antaŭa brita ĉefministro Lordo Wilson, kaj de Federico Major, ĝenerala direktoro de Unesko, kaj la adiaŭan festparoladon de la ĝistama prezidanto de UEA Humphrey Tonkin. Inter la ĉeestantaj diplomatoj estis ankaŭ la ambasadoro de ĈSSR en Britujo s-ro Jan Fidler.

Dum la kongreso estis elektita nova Estraro, kiu dum tri jaroj gvidos la laboron de UEA. La nova prezidanto de UEA fariĝis John Wells, profesoro pri fonetiko en la Universitato de Londono, la vicprezidantoj estas Ulrich Lins, doktoro pri filozofio (D) kaj Roman Dobrzynski, ĵurnalisto kaj regisoro (PL), la ĝenerala sekretario estas Osmo Buller (SF). En la Estraro laboras plue Gregoire Maertens (B), Spomenka Štivec (YU), So Gilsu (ROK), Oszkár Princz (H) kaj Ivo Durwael (B).

La ĉeĥoslovaka scienco kaj kulturo estis reprezentita parte per prelego de Ing. P. Chrdele, SCc., parte per populara slovaka rokmuzika grupo TEAM, kiu estis intervjuita en CAPITAL-radio el Londono; ĝi estas la plej fama pop-muzika stacio kaj la dissendo de Esperanto-kantoj per tiu ĉi stacio estis granda rekonon por TEAM.

Kiel novaj membroj de UEA estis akceptitaj Sovetrespublikara Esperantista Unio, Esperanto-Asocioj de Litovio, Latvio, Pakistano kaj Ebura Bordo.

La Brajtona UK havis ceremonian lanĉon ĵan vendrede la 28-an de julio, kiam pli ol 200 kongresanoj, honoraj gastoj kaj ĵurnalistoj kunvenis en la impona halego Guildhall, la urbodomo de la antikva civito Londono. Tie antaŭ 82 jaroj, post la 3-a UK en 1907, D-ro Zamenhof faris faman paroladon, en kiu li pledis por nova koncepto de la patriotismo, kiu rekonu la kunfratecon de ĉiuj homoj.

La lanco komencigis per laŭtleĝo de tiu zamenhofa parolado, post kio D-ro Humphrey Tonkin bonvenigis la ĉeestantojn nome de la Asocio, D-ro John Wells parolis en la nomo de la Londona Esperanto-Klubo kaj la tuta brita movado, kaj liajn vortojn sekvis saluto de Lordo Rugby nome de la britaj parlamentanoj subtenantoj de Esperanto.

Prof. Wells transdonis al la kunveno skribajn bondezirojn, i. a. de Lia Reĝa Mosto Princo Edward (la plej juna filo de la reĝino), kardinalo Hume, ĉefepiskopo Runcie kaj dramverkisto Alan Ayckbourn, kies teatraĵoj oni prezentis en la Kongreso.

La ceremonia lanco finigis per deklamado en Esperanto (Simo Milojević) kaj la angla (Mark Fettes) de la speciale verkita poemo de William Auld.

(Laŭ Heroldo de Esperanto k.a.)

En la kimria urbeto Caerleon apud Newport /Britio/ kunvenis instruistoj de Esperanto /5 - 12 de aŭgusto 1989/ por pritrakti dum la 23a konferenco de ILEI /Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj/ novajn strategiojn de Esperanto-instruado. Inter 76 partoprenantoj el 19 landoj estis ankaŭ prezidantino kaj vicprezidanto de nia pedagogia sekcio /Barandovská, Malovec/.

Al plej interesaj novaj lerniloj apartenas biografio de Zamenhof en formo de kolora bildrakonto /komikso/, priskribanta ĉefe la infanagon kaj junecon de nia Majstro. La biografion preparis en pluraj lingvoj juna belga instruistino G. Thileux, kiu sukcesis akiri por tiu laboro perfektan profesionan desegniston.

La hungaraj samideanoj preparis serion da fremdlingvaj lernolibroj, en kiuj unu leciono informas pri la internacia lingvo. La lernolibroj estas destinitaj por geknaboj ĝis 15 jaroj, abundas de modernaj koloraj fotografaĵoj, bildoj kaj aktualaj temoj. Preparata estas ankaŭ lernolibro de Esperanto.

ILEI publikigis regulojn por la Internaciaj Ekzamenoj de elementa nivelo /1 200 vortoj pasive, 800 aktive/ kaj de meza nivelo /2 000 vortoj pasive, 1 400 aktive/. ILEI okazigos la ekzamenojn dum Universalaĵ Kongresoj, TEJO-kongresoj kaj aliaj gravaj arangoj. La ekzameno konsistas el tri partoj: la gramatika antaŭtesto /akuzativo, prepozicioj, transitiveco de verboj, korelativoj, participoj, refleksivo, afiksoj, leksiko/, la skriba parto /lega kompreno, eseo, aŭskulta kompreno/ kaj la parola parto /rakontado de tralegitaĵoj E-libroj, historioj de E-movado, E-literaturo kaj E-organizaĵoj/. Internacia Ekzamena Komisiono /IEK/ estas 7-membra, konkretan ekzamenon partoprenas 3 membroj el ili.

La Internaciaj Ekzamenoj povas servi ankaŭ kiel modelo de naciaj ekzamenoj ĉe unuopaj asocioj. La asociaj ekzamenoj kutime konsistas ankoraŭ el la supera nivelo destinita ĉefe por instruantoj de Esperanto. La superaj ekzamenoj estas rekomendataj ankaŭ por arttradukistoj, faktradukistoj, fremdulgvidantoj kaj komerckorespondantoj.

La temo de la konferenco estis "Motivado en la Lerneja Instruado de Esperanto", la ĉefajn prelegojn prezentis Till Dahlenburg el GDR kaj Zsuzsa Barcsay el Hungario. Ĉe malgrandaj infanoj la ĉefa motiveco estas kauzo /instigo de gepatroj kaj instruistoj/, ĉe adoleskantoj kaj plenkreskuloj superas la celo /lingvo mem, ĝia literaturo, ĝia uzeblo en laboro/. El la psikologia vidpunkto ekzistas motivoj eksteraj /akiri bonan noton, gepatran donacon, diplomon, kromsalajron/ kaj internaj /malkovri ion nekonatan, influu la medion, korpa kaj mensa aktivecoj ktp./. La instruisto estu sperta, simpatia, amanta siajn kursanojn, li realigu tutgrupan kolektivan partoprenon en la lernado, estante mem membro de la lernanta kolektivo. Rekomendindas, ke li preparu temojn, kiuj ankaŭ por li mem estas novaj, ekz-e kiu estis Beethoven, Galilei, Ford, ĉu indas esplori la kosmon ne esploriginte la teron, kian signifon havas la koloroj sur flagoj kaj blazonoj, kiuj vortoj havas komunan originon /traktoro - trajno - treni - treni/, kiajn tipajn gestojn uzas unuopaj nacioj, analizo de famaj mondverkoj, fabeloj aŭ proverboj, diskuto pri ili ktp.

Stephen Thompson el Britio prezentis motivadon per muziko kaj kantado, Reto Rossetti analizis instruadon per humuro, Marin Bacev el Bulgario kaj William Simcock el Britio montris la instigan rolon de korespondado, precipe ĉe la infanoj. Stefan MacGill el Hungario demonstris lernadon per ludoj kaj scenetoj uzante bildojn: la instruisto ekz. klopodas vendi pentritan domon al lernanto, kiu scias nur unu frazon, "kio estas tio?", kaj la instruisto respondas ĉiun lian demandon: tio estas pordo, tio estas fenestro, tio estas ĉambro ktp. Poste la kursano simile vendas la domon al plua lernanto. En alia sceno unu kursano vendas flugbiletojn, alia volas flugi al Novjorko k.s. La ĉeĥoslovakaj reprezentantoj prelegis pri niaj korespondaj kursoj.

La konferenco ankaŭ decidis starigi Fondaĵon de ILEI por helpi la E-instruadon en la landoj de la t.n. tria mondo, kaj arangi bibliotekon de ILEI por diversaj lernolibroj.

SOROBANO

Dum la ILEI-konferenco en Caerleon prezentis du japaninoj motivadon de E-instruado ankaŭ per sorobano, fama japana abako /bido-kalkulilo/, kiu estas tre konforma al la kreado de numeraloj en Esperanto. Antaŭ 450 jaroj la sorobano foriris el Ĉinio kaj alvenis al Japanio, kie ĝi estis pliperfektigita. Ĉis nun la japanoj uzas ĝin, ĉar ĝi estas pli rapida ol elektronikaj kalkuliloj kaj donas al la homa menso pli klaran imagon pri matematiko. Nuntempe en Japanio daŭre ekzistas 12 mil soroban-lernejoj kaj 30 mil profesie organizitaj instruistoj. En Caerleon okazis minikurso de sorobanado; al interesitoj mi volas malkaŝi principon de tiu kalkulilo. Sorobano estas facile farebla el niaj porinfanaj bido-abakoj.

En ligna kadro estas fiksitaj stangetoj, sur kiuj moviĝas 5 bidoj dividitaj per lato tiel, ke kvar bidoj troviĝas sub la lato, kaj unu super ĝi. La supra havas valoron de 5, la malsupraj po 1. Se neniu bido tuŝas la laton, estas nulo. Per alŝovo de bidoj al la lato oni ricevas ciferojn de 1 ĝis 9 kiel montras la bildo. Sur la lato troviĝas nigra punkto, kiu prezentas decimalan komon: maldekstre de ĝi estas dekoj, centoj miloj ktp., dekstre dekonoj, centonoj, milonoj ktp. Nia bildo do prezentas la nombron 12345,6789. Se oni volas adicii ekz-e 2003, oni alŝovas en la kolumno "miloj" du bidojn, en la kolumno "unuoj" tri bidojn kaj ricevas la nombron 14348,6789. Se oni volas adicii 30, necesas en la kolumno "dekoj" alŝovi 3 bidojn, sed tie ne plu estas alŝoveblaj. Kion fari? Ĉar $3 = 5 - 2$, sufiĉas alŝovi la supran bidojn /+5/ kaj forŝovi du malsuprajn bidojn /-2/, oni ricevas en tiu kolumno 7. Nun ni volas adicii 0,03. En la kolumno "centonoj" oni bezonas alŝovi tri bidojn, sed tie estas nur du alŝoveblaj. La supra bido jam estas ankaŭ alŝovita, do kion fari? Ĉar $3 = 10 - 7$, sufiĉas en la kolumno "dekonoj" alŝovi unu bidojn /+0,1/, en la kolumno "centonoj" forŝovi 0,07, tio estas forŝovi la supran bidojn /-5/ kaj du malsuprajn /-2/.


Ke ĝi estas komplika? Nur komence, post certa trejnado eĉ infanoj faras tion tute mekanike kaj rapide. La sorobanoj havas kutime pli da decimalaj punktoj, el kiuj oni povas elekti. Kompare kun niaj 10-bidaj abakoj havas la sorobano du avantaĝojn: kvin bidoj estas facile legeblaj per okulo kaj facile moveblaj per dikfingro kaj

montrofinĝro -scle ĉi tiuj du fingroj plenumas la fulmorapidan kalkuladon.

La Esperantaj numeraloj respondas al la disdivido de nombroj sur sorobano, oni povas facile kalkuli laŭ la soroban-kolumnoj: 6512 sesmil-kvincent-dek-du. Uzante la sorobanon oni do povas pli facile ellerni numeralojn en la internacia lingvo. Sorobano ebligas ankaŭ mensan kalkuladon: kiam oni iomete spertigas pri la per-sorobana kalkulado, eblas imagi la bidojn en la menso kaj fariĝi tre rapida kalkulanto parkere, sen kalkulilo.

La lernolibron por multiplikado mi ankoraŭ ne posedas, sed mi komprenis, ke principe la multiplikadon oni povas transformi al adiciado, ekz-e $32.7 = 7.30 + 7.2 = 210 + 14$. La multiplikatajn nombrojn oni bildigas sur la maldekstra flanko de la sorobano kaj la rezulton sur la dekstra. Simile oni faras dividon, potencadon, radikadon, eĉ logaritmojn, sed oni devas scii parkere almenaŭ la fundamentajn kalkultabelojn.

Se vi havas demandojn pri la sorobano, bonvolu kontakti la adreson: La "LIGO DE PER-SOROBANA EDUKADO" de Japanio, Tōkyō-to, Taitō-ku, Sitaya-ni-tyōme 17-4, 110 - Japanio.



Fariĝu abonantoj de "Internacia fervojisto"!

FS ĈEA informas ĉiujn siajn membrojn, neabonantojn de la IFEF-organo Internacia fervojisto, ke ne estas limigo por abono de la revuo por nialandaj membroj. Ni konsilas al ĉiuj membroj de Fervojista Sekcio de ĈEA fariĝi abonantoj de "Internacia fervojisto" kaj fariĝi tiamaniere ankaŭ membroj de Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (IFEF). Paginte la abonkotizon 35,- Kčs vi ricevos jare 6 ilustritajn numerojn de la revuo, estos gustatempe informataj pri la IFEF-kongresoj kaj alia agado de IFEF, povos legi multajn fakajn artikolojn kaj informojn pri la fervojo kaj fervojistoj en diversaj landoj de la mondo k.t.p. Vi povas mendi la revuon skribante al nia distribuanto de Internacia fervojisto Jiří Pištora, náměstí Míru 1746, 560 02 Česká Třebová. Do ne hezitu kaj abonu nian revuon "Internacia fervojisto"! -JT-

Internacia seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" 1989 en Strážnice

Okaze de la solenado de 150 jaroj de la fevoja trafiko sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio la Scienc-Teknika kaj Fervojista Sekcioj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio komune aranĝis SAEST 1989 - Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko. La seminario okazis 7.-9. de julio 1989 en Strážnice, sudmoravia urbo de la tradiciaj internaciaj folkloraj festivaloj, dank'al bona organiza helpo de la loka Esperanto-klubo, funkcianta enkadre de la loka Kulturdomo "Strážničan". Al la seminario aligis 55 partoprenantoj el 10 landoj: Austrio, Ĉeĥoslovakio, Danio, FRG, GDR, Hungario, Jugoslavio, Norvegio, Pollando kaj Sovetunio.

Vendrede la 7an de julio partoprenantoj kunvenis en Brno, ĉefa stacidomo, kie la pli frue alvenintaj povis spekti alveturon de la solena historia vaportrajno el Břeclav okaze de 150-jara datreveno de la alveturo de la unua vaportrajno el Vieno al Brno la 7an de julio 1839. De tie ni komune veturis por viziti fervojan ekspozicon omaĝe al 150-jariĝo de Ĉeĥoslovakiaj fervojoj.

Post trarigardo de la ekspozicio, forsendo de salutkartoj/en poŝtoŝtupo oni vendis specialajn okazajn poŝtkartojn kaj uzis porokazan stampon/ kaj refreŝigo en bufedvagono ni per speciala aŭtobuso forveturis al Strážnice.

Sabate la 8an de julio matene je la 8a horo la partoprenantoj de la seminario estis solene akceptitaj en Urbdomo fare de kamarado Vladimír Sládek, la prezidanto de la Urba Nacia Komitato en Strážnice. La solenan akcepton partoprenis ankaŭ vicprezidanto de la Distrikta Nacia Komitato en Hodonín k-do Antonín Seménka, vicprezidanto de la Kulturdomo Strážničan PhDr. Danuše Adamcová, prezidanto de ĈEA inĝ Petr Chrdle, CSc., kaj prezidantoj de la supre menciitaj sekcioj. Dum la akcepto oni akcentis la gravan rolon de Esperanto kiel konvena kaj facila internacia lingvo kaj interkomprenigilo.

Alie la sabato estis tute labora tago. En salono de la Kulturdomo "Strážničan" la partoprenantoj aŭskultis sume 16 prelegojn, dividitajn en kategorioj Historio, Trafiko, Vivomedio, Tekniko, Terminologio kaj Diversaĵoj. La plejparto tamen koncernis la fervojan trafikon kaj la trafikon ĝenerale. La plenaj tekstoj de ĉiuj prelegoj aperos presforme.

La sabata vespero estis dediĉita al kultura programo - prezentado de la folkloro ensemblo "Lipina" el Vracov, kiu kun akompano de zimbazona muziko "Lipina" kun sia estro, inĝ. Karel Hirsch, prezentis al ni vicon da belaj folkloraj dancoj kaj kantoj el la gastiganta regiono, nomata Moravia Slovakio. Ĉis noktaj horoj oni poste gaje babilis kaj kantis, gustumante bongustajn sudmoraviajn vinojn.

Dimanĉe antaŭtagmeze daŭris SAEST en la Kulturdomo per diskutado pri la faritaj fakprelegoj, pri fakaj/precipe fervojaj/ terminaroj kaj pri kunlabore inter TK de IFEF kaj TEC de UEA.

Posttagmeze la interesitoj vizitis kaj trarigardis la subĉielan muzeon de Sudorienta Moravio - skanzenon en Strážnice, krome oni

spektis tie prezentadojn de la sveda folklora ensemblo FOLKSDANSLAG WIMMERBY kaj de la moravia zimbazona muziko de Jos. Černík el Slušovice.

Lunde la 10-an de julio unu el partoprenantoj, direktoro de la norvega Bergena Fervojo, s-ro Per Engen kun prezidanto de ĈEA ing. Petr Chrdle, CSc., estis akceptitaj fare de la direktoro de la Regiona Direkcio de la Ĉeĥoslovakiaj Ŝtataj Fervojoj en Olomouc ing. Jindřich Zapletal. Ambaŭ direktoroj dum amika interparolo informis unu la alian pri nuntempaj problemoj de ambaŭ fervojoj, precipe pri demandoj de la sekurigo, fidiindeco kaj kvalito de la trafiko dum vintra periodo, pri rekonstruaj laboroj kaj rentabilitato de la fervoja trafiko kaj interkonsente deklaris, ke la fervoja trafiko inter alia ankaŭ laŭ ekologia gvidpunkto ankaŭ estonte rolos gravegan rolon en transporto de la pasaĝeroj kaj varoj.

Jindřich Tomášek

PLUAJ INFORMOJ

INTERNACIA RENKONTIĜO DE INVALIDOJ

La Internacia Renkontiĝo de E-Invalidoj en Olomouc (19. - 27. 8. 1989) okazis sub aŭspicio de Distrikta Komitato de Asocio de Invalidoj en Olomouc. Partoprenis ĝin entute 77 gesamideanoj (34 eksterlandanoj) el 4 landoj. La plej granda grupo alveturis el USSR, pli malgrandaj el Hungario kaj Pollando. Post alveno ni enloĝiĝis en altlerneja studenta hejmo. Vespere okazis interkonatiga vespero, kie ĉiu povis prezenti sin mem eĉ siajn gesamikaĵojn kune alveturintaj.

Dimance s-ano Vaněček malfermis solenan kunsidon per bonvenigo de ĉiuj gastoj kaj partoprenantoj. Nome li bonvenigis: s-inon Žižková, sekretarinon de distrikta komitato de Asocio de Invalidoj, s-on ing. J. Pop, estron de la kulturfako de Urba Nacia Komitato, s-inon Hrabáková, estrarinon de Urba Komitato de Nacia Fronto, s-on ing. J. Krob, membron de Centra Komitato de ĈEA, d-on Mohapl, prezidanton de E-klubo Olomouc, s-anon J. Chytil, prezidanton de E-klubo Přerov kaj s-on Hanuš, redaktoron de ĵurnalo Lidová demokracie (Popola Demokratio).

Post la solena malfermo komenciĝis la unua seminario gvidata de s-ano Mráz. La temo: Esperanto por invalidoj, Esperanto en la mondo. La dua seminario (lunde) - Esperanto kiel kuracilo - gvidis s-ano Vaněček. Marda antaŭtagmezo estis rezervita por la tria seminario gvidata de ing. Krob: Esperanto inter nevidantoj - ĝia instruado. La lastan seminarion gvidis s-ino Papenková, ĝia temo: Praktika utiligo de Esperanto por rulseĝuloj. Ŝi prezentis ankaŭ komputoron kiel lernhelpilon.

Ankaŭ kulturprogramo estis riĉa kaj diversspeca, konsidere vere someran veteron senteme elektita. Kion rememorigi antaŭ ĉio? Ĉu la belegan urbon Olomouc kaj ĝiaj historiaj monumentoj, aŭ la tuttagan ekskurson al Sankta Monteto kaj zoogardeno? Ĉu prefere la florekspozicion FLORA OLOMOUC, kien iuj el ni revenis kelkfoje? Longan tempon ni rememoris la gvidanton de Geoex, kiu ĝis malfrua vespero gvidis nin tra la urbo kaj senlace klarigis al ni ĝian historion kaj nuntempon.

Sabate, la lastan tagon de renkontiĝo nin veturigis du busoj al Havířov, kie ni partoprenis solenan malfermon de FESTOTAGUJ de ĈEA.

Dum la tuta semajno regis kora, amika atmosfero karakterizata per ligo de multaj novaj amikaj rilatoj. Ĉiuj havis grandan eblon paroli Esperante kaj plifortigi siajn scipovojn. Poste venis solena fermvespero - fine jam nur la lastaj manpremoj, la lastaj ridetoj (eĉ larmetoj) kaj - ĜIS LA REVIDO VENONTE!

(Jindra Dubinová en
Informilo de Invalidoj)

RENKONTIĜO DE E-INVALIDOJ EN ĈESKÁ TŘEBOVÁ

En la tagoj de la 22-a ĝis la 25-a de junio okazis en fama urbeto Česká Třebová renkontiĝo de E-invalidoj. Partoprenis ĝin entute 34 invalidoj el Ĉeĥoslovakio kaj tri gepoloj.

Post komuna vespermanĝo de la unua tago efektiviĝis modesta, sed vere amika inaŭguro, inkluzive de prezentigado.

Je la naŭa horo de la dua tago komenciĝis jam la planitaj laborprogramoj. S-ro Vaněček respondis ĉiujn demandojn kaj klarigis multajn regulojn de la E-gramatiko. Partoprenintoj estis dividitaj en kelkajn grupetojn, enkadre de kiuj posttagmeze komenciĝis instruado. En nia entute 6-membra grupeto ni ekzercis precipe paroladon, ĉar temis pri relative spertaj lernantoj, havantaj jam sufiĉan vortostokon, sed al kiuj mankas konversaciaj spertoj. Bedaŭrinde al multaj lernantoj mankas precipe ebloj paroli kun iu. Je la kvara posttagmezo ni estis veturigataj de la stacidomo al la ripozloko de iu ĝardenista organizo. En ombro de altaj arboj ni ripozis kaj gaje babilis. La pli kapablaj helpis konstrui piramidon el la jam preparita ligno, kaj poste estis ekbruligita la festa tendarfajro. Surs-tange rostitaj kolbasetoj al ĉiuj tre gustis. Post proksimume unu-hora ĉefajra babilado iu el Česká Třebová proponis, ke ni veturu al restoracio "Na horách" /Sur Montoj/, kie estis aranĝita amika renkontiĝo de itala amatora vira kanthoro Rifugio /32 laboristoj amatoroj/ el urbo Seregno, kun loĝantoj de Česká Třebová.

Estis tie tre bela vespero, plena de kantado, ĉu kantis la ĥoro meze de la salono, ĉu gaje kantis ĉeĥoj aŭ italoj ĉe table. Kelkajn "internaciajn" kantojn /Škoda lásky - Damage de 1 amo/ kantis ĥore ĉiuj plenigintoj de la granda salono. Neatendite regalis nin italaj amikoj per bongusta itala ruĝa vino.

Sur la memortabulo de la restoracio "Na horách" oni povas legi ke ĉi tiun lokon vizitis eĉ la fama ĉeĥa verkistino Božena Němcová. Krom la strato en la urbo nomiĝas sianome ankaŭ unu arbarvojo kaj eĉ unu benko en la arbaro proksime de la restoracio.

Sabate je la naŭa ni daŭrigis instruekzercon programon en grupetoj. Nia grupeto komencis la tagon ĉe la komputoro. Samideano Panenka klarigis ĉion necesan kaj poste nur zorgeme kontrolis nin. Dum plenumado de la taskoj ni ĉiam pridiskutis la demandojn kaj post konsento de plimulto ni respondis al la scivolema komputoro. En instruado de Esperanto tio estas relative nova, sed interesa, amuza kaj taŭga maniero. Post "komputora leciono" ni iris en la al ni jam konatan ejon, kie s-ino Malinská aŭskultigis al ni la paroladon de L.L.Zamenhof, prelegitan inaŭgure de la unua esperantista kongreso.

Post tagmanĝo okazis "posttagmezo de demandoj kaj respondoj". S-ano Vaněček respondis ĉiujn demandojn, ĉu antaŭe preparitajn, ĉu dumtempe metitajn. Post elĉerpigo de ĉiuj demandoj efektivigis la planita promeno tra la urbo, kiu al ĉiuj plaĉis. Post vespermango ekinteresis ĉiujn precipe s-ano Pištora el Česká Třebová, kiu per amuza maniero rakontis pri sia vojo tra kelkaj okcidentaj landoj.

Dimanĉo, la lasta tago de la renkontiĝo. Influitaj per la proksimiganta adiaŭo estis la lastaj horoj iomete nostalgiaj. Eĉ larmetoj aperis. Larmetoj de la agrable travivitaj horoj en amika medio, inter bonaj amikoj, gvidataj de gesamideanoj Vaněček, Malínská, Nováková. Ni ne forgesu eĉ grandegan laboron, faritan de geklubanoj el Česká Třebová. Ĉiuj menciitaj funkciuloj kaj geklubanoj jam preparas pluajn renkontigojn. Unu bela renkontiĝo finiĝis, do, multajn sukcesojn al la sekvontaj.

František Molík, Náchod

MI ESTADIS EN ĈESKÁ TŘEBOVÁ

Mia unua eksterlanda vojaĝo estis Esperanta. Mi decidiĝis efektivi ĝin estante scivola, kiel dank'al Esperanto mi povos interkomprenigi kun alilandanoj. Mi decidiĝis des pli volonte, ke mi estis partoprenonta renkontigon de invalidoj, kiuĵ, simile kiel mi, elektis Esperanton kiel rimedon por larĝigi siajn kontaktojn kun la mondo ĉirkaŭiganta ilin. La vojaĝo al Česká Třebová estis ankaŭ okazo por ekkoni, almenaŭ iom, logantojn kaj belecon de la proksima kaj amikeca lando.

Jam ĉe la landlimo, spite la onidirojn, mi renkontis lertan kaj gentilan dogankontroloron. Ĉi tio estis anonco de sukcesa ekskurso. Mian bonan agordon ne ekmalpacigis eĉ unu plenscivola demando de la doganisto. Nu, kiam li eksciis, ke mi veturigas esperantajn librojn kiel donacojn, li demandis min: "Kaj pri kio ili temas?" Nun mi pensas, ke eble li ankaŭ estas esperantisto.... Nur kial ni interparolis pole kaj ĉeĥe anstataŭ Esperante? La dogankontrolisto estus tiam ankoraŭ pli agrabla.

Oni scias, ke ĉeĥa, slovaka kaj pola lingvoj kiel lingvoj slavaj intersimiligas. Sed por plene interkompreniĝadi, oni ne povas malbezoni profundan sciadon pri ili. Escepte se por faciligado ni uzos unu komunan lingvon - Esperanton. Kiel praktika ĝi estas, mi jam konvinkigis. Dank'al ĝi mi sukcese interkomprenigis kun organizintoj kaj partoprenintoj de la renkontiĝo de esperantistoj-invalidoj. Kaj eĉ, por mia surprizo kun geposedantoj de la ĉambro, en kiu mi logigis. Jen unu el iliaj filinoj, kiel neatendite montrigis al mi, scias Esperanton tre bone, do ŝi perfekte plenumadis rolon de interpretistino.

Mi eksciis, ke ŝi frekventis Esperanto-kurson en Česká Třebová. Tie estas tre forta Esperanta medio. Mi rigardis kun admiro dikan kronikon, kiun tieaj esperantistoj kompilas. Ĝi estas dokumento de iliaj riĉaj kaj heterogenaj laborformoj. Pri aktiveco de la amikoj el Česká Třebová konvinkigis ankaŭ ni, partoprenintoj de la renkontiĝo. Dum ĉiuj tagoj de la estado en ĉi tiu urbo ni sentadis ilian protekton, helpon kaj interesigon pri nia laboro.

La renkontiĝintoj estis invalidoj venintaj el diversaj regionoj de Ĉeĥoslovakio. Inter ili estis partoprenintoj de korespondanta Esperanto-kurso gvidata de Josef Vaněček el la sekcio de invalidoj de CEA. Mi kun alia esperantisto el Pollando kaj lia edzino estis unusolaj fremdlandanoj.

La renkontiĝo celis perfektigon de praktika uzado de Esperanto kaj pliprofundigon de scio pri ĝi. Krom instruado en plenkunveno okazis ankaŭ renkontigoj en malgrandaj grupoj. Dank'al variaj formoj de la laboro /dialogoj, ludoj, humoraĵoj k.a./ la okupoj estis nur agrableco. Tre interesa por mi estis monro de komputila programo por instruado de Esperanto. Prilaboris kaj prezentis ĝin unu el partoprenintoj de nia renkontiĝo - Luděk Panenka.

Ni sendube profitis dum la renkontiĝo, antaŭ ĉio pro tio, ke mi povis multe interparoli. Kaj ĉar pro neceso oni uzis ankaŭ la ĉeĥan lingvon /laŭ projekto la arango ja ne estis internacia/, do okaze de ĉi tio mi lernis ankaŭ kelkajn ĉeĥajn vortojn.

Kaj mi preskaŭ komprenis esencon de okazigitaj diskutoj pri laboro de la sekcio, pri ĝiaj atingoj kaj diversaj malfacilaĵoj. Nun mi scias, kiel malfacile estas organizi la renkontigon, precipe akiri gustan konstruaĵon por logigado. Kompreneble se la organizintoj sukcesus fari la arangon nur en unu domo, kie estus logado, manĝado kaj lernado, tiam estus tio la plej bona solvo. Ĉi tio estas tre grava por invalidoj movigantaj per lambastonoj aŭ ĉaretoj.

En Česká Třebová estis admirinda vidaĵo, kiam la partoprenintoj de la renkontiĝo solaj aŭ kun helpo de bonvolemaj homoj venkadis ĉiujn obstaklojn. Kvazaŭ simbolo de la volo por venki la malfacilaĵojn, estis grimpado sur la krutajon, kie troviĝas la dektricentjara preĝejo Sankta Katarina. Ĉi tio okazis dum la belega promenado tra la urbo por ekkoni iujn anguletojn de ĝi.

En alia tago estis atrakcia tendarfajro kaj rostitaj kolbasetoj. Tamen vera neatenditaĵo por ni estis renkontiĝo kun la itala kuruso "Coro il Rifugio", kiu en la sama tempo estis gastigata en Česká Třebová. Mi ne scipovas priskribi, kiel mi ravigadis, kiam mi aŭdis intersaĝe italiajn aŭ ĉeĥajn kantojn kaj kiam mi vidis spontane ludantajn ĉeĥojn.

Mi longe memgros la tagojn de la 22-a ĝis la 25-a de junio 1989. Mi forveturis el Česká Třebová pli riĉa anime kun firma decido pli bone ekregi Esperanton.

Zdislaw Dziubecki
ul. Belzacka 64 m. 36
97-300 Piotrków Trybunalski
Pollando

La sekcio de ŝako de Ĉeĥa Esperanto-Asocio komisiita de Esperanta Ŝak-Ligo Internacia aranĝos la III-an VERDAN ŜAKOLIMPIKON en Poděbrady, de la 5-a ĝis la 14-a de julio 1991. Oni antaŭvidas la ŝakolimpikon de 4-opaj viraj naciaj teamoj kaj 2-opaj virinaj teamoj, la grupon "B" kompletigos teamoj de urboj kaj kluboj, en grupo "C" ludos junularaj teamoj. Informojn petu de la prezidanto de la preparkomitato Václav Štěpánek, Macurova 16, CS-143 00 Praha, Ĉeĥoslovakio.

J. F. Chaloupecký

La elstara politika, socia kaj korpeduka aganto Jiří František Chaloupecký (prononcu ĥaloupetski) naskiĝis antaŭ cent jaroj la 28-an de februaro 1890 en Dolní Počernice apud Prago.

Lia patro estis fervojisto kaj sian infanaĝon Jiří František travivis en fervoja gardodometo en Běchovice. Ĉar li bone lernis, liaj gepatroj ebligis al li studi en realgimnazio en Prago-Karlín. Sed la sciavida kaj meditema proleta studento baldaŭ enkonfliktigis kun religiaj klerikalaj instruoj de profesoroj kaj devis forlasi la lernejon. En 1906 li eklaboris kiel fervojisto, komence kiel sensalajra praktikanto, ekde 1908 kiel provizora suboficisto.


La proleta origino kaj la mizera vivo de la gepatroj, la strikoj kaj luktoj de laboristoj tre frue kondukis la junan Chaloupecký en la laboristan movadon. Li aktive laboris en organizaĵo de social-demokrata junularo, poste en la social-demokrata laborista partio, li fondis laboristan Esperanto-organizaĵon kaj asocion de senreligiuloj. Estante dudekjara li fariĝis funkciulo de fervojista sindikata organizaĵo, li publicis en la gazeto de Asocio de laboristaj gimnastikaj unioj kaj en la j. 1912 li estis elektita delegito de laboristaj gimnastikaj unioj.

Jam en la jaro 1910 li komencis publikigi instru-artikolojn por laboristaj memlernantoj. Li verkis tekstojn kun materialisma, marksisma koncepto akre direktitajn kontraŭ la instruado en la aŭstro-hungaraj lernejoj, kontraŭ religiaj falsdoktrinoj, supersticoj kaj idealistaj konceptoj.

Jam kiel fama laborista funkciulo komence de la jaro 1914 li akiris ateston pri maturec-ekzameno en la sama lernejo, kiun li estis devigita antaŭ jaroj forlasi. Liajn altlernejajn studojn malhelpis la komenco de la unua mondmilito kaj forveturo al la fronto.

J. F. Chaloupecký baldaŭ konstatis la imperisman karakteron de la mondmilito (tion pruvas lia ĝis nun ne publikigita verko "La Europa Milito 1914") kaj la historian gravecon de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. Post la estigo de la Ĉeĥoslovaka Respubliko en la j. 1918 li apartenis inter la avanjajn batalantojn por la socialisma karaktero de la respubliko kaj por la konstituigo de vere revolucia partio. Post la fando de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio li fariĝis kandidato de la unua Centra Komitato de KPĈ.

En la laborista gimnastika movado li estis rekonata reprezentanto de la marksista maldekstrularo kaj fondinto de la proleta gimnastika organizaĵo - Federacio de Laboristaj Gimnastikaj Unioj, li estis aŭtoro de statuto de la Federacio kaj iniciatinto de la laborista saluto "Honoro al laboro". Li estis iniciatoro kaj kunkreinto de la gimnastikaj solenaĵoj de la Federacio de LGU en Maniny en la j. 1921, kiujn li poste nomis "spartakiado".



La gazetoj kaj broŝuroj redaktitaj de Chaloupecký havis surskribojn ankaŭ en ido



Jiří František Chaloupecký kiel kaporalo de la aŭstria armeo en la jaro 1916

Li fariĝis la unua redaktoro de Výboj (Ofensivo) - la organo de la Federacio de LGU. Sed li estis fekunda aŭtoro de instruaj verkoj kaj broŝuroj, ekz. Frideriko Engels, Kio estas la materio?, Instru-folioj de ido, Kiel edukigi sen instruisto, Fundamentoj de la ĉeĥa ortografio (sub pseŭdonomo Jiří Ráz), Oratora tekniko (sub pseŭd. Antonín Knobloch), Rondiro de fortoj kaj materioj en la viva korpo (ĝi aperis nur post lia morto).

La laboro kaj aktivecoj de J. F. Chaloupecký estis enormaj. Sed fine pereiga malsano - tuberkulozo - venkis la vivoenergion de Chaloupecký kaj li mortis la 10-an de aprilo 1922 en la aĝo de nuraj 32 jaroj.

Gravan aktivecon fordonis J. F. Chaloupecký al la nialanda laborista Esperanto-movado. Li tre frue konstatis la gravecon de la Internacia Lingvo por la tutmonda laborista klaso kaj multajn siajn fortojn li dediĉis al laboro sur tiu ĉi kampo. En la jaro 1911 li fondis Laboristan Unuigon Esperantistan kiel fakon de la "Laborista Akademio" en Prago kaj kune kun Robert Šáda kaj Josef Šídlo li fondis kaj redaktis gazeton "La Kulturo, gazeto de bohema laboristaro esperantista en Aŭstrio". La unua kongreso de la Laborista Unuigo Esperantista okazis la 9-an kaj 10-an de septembro 1911 en la granda salonego de restoracio de Křížek en Prago. La unuan tagon (sabatespere) la kongreso estis inaugurita kaj R. Šáda raportis pri la agado kaj taktiko de la organizaĵo. La sekvan tagon (dimanĉe) estis prezentitaj jenaj referaĵoj: "La ekesto, evoluo kaj disvolvigo de la Internacia Lingvo (J. Šídlo), "Esperanto kaj socialismo" (J. F. Chaloupecký) kaj "La praktika signifo de Esperanto por la laboristaro" (Kučera).

Tri monatojn poste - de la 23-a ĝis la 27-a de decembro 1911 okazis en la Nacia domo en Saichov la X-a kongreso de la Bohemslava Social-Demokrata Laborista Partio. En la lasta tago de la kongreso J. F. Chaloupecký proponis al la kongreso jenan projekton de rezolucio:

"La X-a kongreso de la Bohemslava Social-Demokrata Laborista Partio okazinta en decembro 1911 en Prago rekonante la gravecon de la tutmonda lingvo internacia por la internacie organizata proletaro kaj precipe por la laboristaro de malgrandaj nacioj, kiuj ĝuste pro sia malgrandeco estas de fremdaj landoj malatentataj kaj silentigataj en siaj apartaj sopiroj, rekomendas al la organizitaj gekamaradoj la propagandon de Esperanto kaj postulas de la kamaradaj institucioj kaj redakcioj, ke al tiu ĉi propagando ili laŭeble estu helpemaj."

La tekston de tiu ĉi rezolucio rekomendis per siaj subskriboj multnombraj fruntlokaj gvidantoj de la movado, inter ili deputitoj L. Aust (por la reprezentantaro de la partio), R. Jaroš, A. Němec (por la plenumkomitato de la partio) kaj d-ro L. Winter (la referento de la partio), plus K. Beran, V. Brodecký, A. Buriánek, F. Ebel, E. Hegner, J. Janota, A. Klacel, A. Muna, J. Nosek, L. Pavel, J. Reiter, D-ro J. Spálený, A. Srba, J. Stivín (por la redakcio de Právo lidu - Rajto de la popolo), E. Škatula, R. Tayerle, J. Weis, A. Zápotocký, V. Zavadil k.a. Proponkomisiono (referento L. Pik) rekomendis la projekton al la kongreso por akcepto kaj ĝi estis efektive ratifita. Ĝi estis granda sukceso de Esperanto ĉe la ĉeĥa social-demokrata partio precipe pro tio, ke ĝenerale en tiu partio regis granda malemo kontraŭ la Lingvo Internacia. Kaj grandan kaj fakte solan meriton pri la sukceso havis J. F. Chaloupecký.

Tiom pli granda estis la konsternigo, ke en la jaro 1913 Jiří Fr. Chaloupecký forlasis Esperanton kaj farigis adepto de Ido. Eŝtis probable ideologiaj motivoj, kiuj instigis lin al tiu ĉi ago, versajne ankaŭ malakordoj kun liaj kamaradoj-esperantistoj. Chaloupecký laboris plu por la ideo de la Lingvo Internacia, sed de tiam por Ido kaj kontraŭ Esperanto. Tio estis tre doloriga fakto por la ĉeĥoslovaka laborista Esperanto-movado. Dum en aliaj landoj ekzistis du paralelaj movadoj - la laborista kaj "la neŭtrala", en Ĉeĥoslovakio la sola Esperanto-movado, kiu vivis kaj disvolvigis, estis "la neŭtrala", dum la laborista fakte nur vegetis. Ĉu tiun staton influis ankaŭ J. F. Chaloupecký?

(Jiří Patera)

Skribis al ni s-ino Rejna de Jong, Nederlando:

Koran dankon pro la sendo de Starto 4-89. La pagoj pri kaj de Jiří Karen kaj mi kompreneble tre gojigis min. Mi afable dankas vin pro la atento al mia verkaro... Cetere la tuta numero estas tre interesa. Estas la unua fojo ke mi vidis kaj legis vian revuon kaj ĝi agrable surprizis min.

Jiří F. Chaloupecký

Kian signifon havas la decido de la "Delegacio"?

1. Unue iom da historio. Volapük kaj Idiom Neutral krasis kaj Esperanto antaŭ la jaro 1900 nur vegetis. Franca aristokrato de Beaufront kunmetis novan internacian lingvon: ĝi malaperis sen reŝo, Léon Bollack elpensis Bluan Lingvon, Peano konstruis Nove Latine, Molenaar donis al la mondo Panromanon kaj dane prof. Jespersen ankaŭ provis krei sian lingvon tutmondan, sed ĉiuj ĉi projektoj restis nur sur papero. La sola Esperanto poime enpraktikigis kaj antaŭvidis en estonteco certan sukceson. La nomitaj aŭtoroj de mondlingvoj fine rezignis pri siaj esperoj je heredaĵo de la Zamenhofa gloro, nur markizo de Beaufront ne. En la jaro 1899 ni vidas lin en la vicoj de la plej lertaj ĉefaj esperantistoj diligente agitantan por Esperanto. Neniu tiam suspektis, kian intencon li havas.

2. En la j. 1900 sinjoroj Beaufront, Couturat kaj Leau subite komencis kunmeti grupon "Delegacio por elekto de helpa lingvo internacia". Tiu ĉi Delegacio estis nenio oficiala, nur libervola grupiĝo de ĉiuspecaj societoj eminentaj kaj sensignifaj kaj de institucioj nek kaj sciencaj, kiuj en la Delegacion laŭ la postulo de tiuj sinjoroj nomumis sian "delegiton". La Delegacio neniam ekzistis sen agitado de esperantistoj.

3. Laŭ vidpunkto lingvistika la Delegacio havas nenian gravecon sciencajn, ĉar en ĝi kunsidis ankaŭ tiaj societoj kiel "Societo de malamiko de polvo", "Societo de ekslernantinoj de knabina lernejo", "Laborista Korpokultura Unuigo Lassalle" en Židenice apud Brno ktp. Ekz. Ĉeĥio estis reprezentita - per tipografo s-ro Kajš por "Nutrajlaborista societo en Židenice"! Ĝi estis simple kurteno de la estonta demagogio - nenio pli.

4. Tiu ĉi Delegacio neniam kaj nenie kunvenis kaj neniun lingvon ĝi esploris, rifuzis nek aprobis; la aserto, ke Ido estas akceptita de la Delegacio, estas mensoĝo!

5. La Delegacio faris nur solan aferon: ĝi elektis en la j. 1907 komitaton (12 membrojn), kiun proponis Couturat ktp. kaj elektis per akriba formo. Poste kun ĝi neniu el tiuj sinjoroj parolis - temis nur pri la formalizaĵo de la elekto. Poste - negro plenumis sian mision - li povis do foriri!

6. La komitato mem kooptis ankoraŭ 4 membrojn. Esperantistoj reprezentigis sin - per Beaufront, ne konante liajn intencojn. Honora prezidanto de la Delegacio estis elektita W. Förster, astronomo, membro de la Berlina akademio de sciencoj, prezidanto prof. Ostwald, sekretario Couturat, kasisto Leau. Ankaŭ la komitato neniam kunvenis kaj pri nenio traktis, ĝi elektis nur - laŭ propono de Couturat kaj Leau - kelkmembran permanentan komisionon, al kiu ĝi komisiis la problemon.

7. En tiu ĉi komisiono kunsidis ses membroj, nome L. de Beaufront, reprezentanto de d-ro Zamenhof (!), Ostwald, prof. pri kemio en Lajpcigo, Jespersen (aŭtoro de propra lingvo!), Baudoin de Courtenay, prof. en Peterburgo, Couturat, prof., Leau, prof.

8. Al la komisiono estis subite sendita anonima propono de nova lingvo, plagiato de Esperanto; la aŭtoro subskribis sin per signo "Ido". La komisiono kunsidis dum 9 tagoj (!) matene kaj posttagmeze kaj en tiuj ĉi 18 kunsidoj (!) esploris sci-

ence ĉiujn ecojn de lingvoj vivaj, mortaj kaj artaj kun ĉiuj iliaj gramatikoj, vortaroj kaj literaturo kaj aprobis poste per 4 voĉoj kontraŭ 2 tiuj projekto de ŝanĝita Esperanto, post kiam ĝi faris en ĝi ankau novajn ŝanĝojn laŭ Jespersen. (Tion cion dum 9 tagoj!) Tio estis la voĉdonado de la Delegacio, kie per plimulto de sola voĉo kvar homoj permesis al si trudi al kelkaj dekmiloj da esperantistoj anoniman plagiaton, kun kiu oni nun faras tian bruon!

9. Poste montriĝis, ke la aŭtoro de Ido estas tiu, kiu reprezentis esperantistojn en la komisiono, L. de Beaufront, liaj kunlaborantoj estas Couturat kaj Leau, kiuj por tiu celo elpensis la tutan Delegacion, kaj kompletigas ilin Jespersen, ĵaluza malsukcesa kandidato de la gloro de Zamenhof, ĉiuj kvar delongaj maskitaj kontraŭuloj de Esperanto, kiuj jam mem havis plimulton en la komisiono! La statuto de la Delegacio speciale difinis, ke la Delegacio ne kreas lingvon novan, sed elektos nur iun gismunan. Sed pri tio la plagiatoj ne zorgis kaj trankvile agis super sia kompetenteco...

10. La tuta historio de la Delegacio estis epokfara trompo, sola siaspeca. Ĝiaj aŭtoroj preparis la grundon zorgeme dum tutaj sep jaroj, fine ili iniciatis la decidon opiniante, ke ilia verko tuj estos de esperantistoj akceptita kaj kronita per mondsukceso; por unua momento ili kaŭzis ankau senteblan ŝokon kaj krizon inter ne-informatitaj esperantistoj, kiuj pri la propra esenco de la afero sciis nenion, sed poste ili eksentis teruran elreviĝon. Membroj de la Delegacio mem protestis kontraŭ la trompo, kiun sinjoroj Couturat, Leau kaj Beaufront faris sub ilia nomo, kaj guste la plej signifaj membroj: ili eldonis prese "Protestation" kun 80 subskriboj de elstaraj scienculoj, kiuj rifuzis Idon kaj aprobis la pli perfektan Esperanton. Mi mencias iujn el ili: Boirac, rektoro de Akademio en Dijon, C. Bourlet, prof. de artoj kaj metioj en Parizo, Broca, prof. de medicina fakultato en Parizo, T. Cart, prof. en Lernejo de politikaj sciencoj en Parizo, Chavet, delegito de Pac-Asocio, D-ro Dor, univ. prof. en Berno, Duverdyn, del. de belga Ruĝa Kruc, Farjon, del. de komerca cambro en Boulogne s. M., D-ro Toveau de Courmellies, del. de Asocio de sciencistoj, Gariel, membro de medicina Akademio en Parizo, Grosjean-Maupin, univ. prof., Héluin, del. de komerca cambro en Dijon, D-ro laisant, del. de la franca Societo por la progreso de sciencoj, Meray, membro de la franca Akademio de sciencoj, Le Mounier, univ. prof. en Nancy, Meyer, del. de komerca cambro en La Rochelle, F. Moschelles, del. de la Tutmonda Pakkongreso, Mielle, del. de Akademio Societo de Altaj Pirenoj, R. Paillot, membro de universitato en Lille, J. Rhodes, del. de komerca cambro en Keighley (Anglio), A. Sabadell, del. de "Akademia de Taquigrafia" en Barcelono, D-ro Saquet, del. de Akademio Societo en Nancy, R. de Saussure, docento de universitato en Genevo, gen. Sébert, membro de Akademio de sciencoj en Parizo, De Smeel Giorling, nacia sekretario de la Delegacio por Danlando, D-ro Soulier, del. de Nacia Societo Kuracista, Witteryck, del. de komerca kaj industria sindikato kaj ankoraŭ vico (pli ol 50) da mond fama sciencistoj, kiuj rezignas pri la "scienca" Ido.

Kiam eĉ la honora prezidanto de la Delegacio, scienculo Förster, ekŝiĝis kaj protestis kontraŭ la trompo, la afero estis decidita. Hodiaŭ jam nur la malesperaj demagogoj en la redakcio de "Progreso" parolas ankoraŭ pri la "oficiala decido" de la Delegacio, kies kulpo estis jam longe pruvita. La tuta cetera mondo mokas ĝin kaj ni esperantistoj iras malgrau ĝi trankvile plu - nian propran vojon!

(El "Bohema Revuo Esperantista", 1911, esperantigis Jiří Patera)

La mondlingvo

Al la historio de la "Delegacio"

....
S-ro Pitlik klopodis pruvi en sia entaŭ nelonge en ĉi tiu gazeto enpresita artikolo, ke la reformoj valoras nenion, ĉar sur honestaj fundamentoj ne staris eĉ la "Delegacio", kiu estas ilia patro. Tio estas logiko de ĉiu eklezio, kiu decidas pri vero - per plimulto de voĉoj, sciencajn problemojn ĝi solvas per lotado de nigraj kaj blankaj globetoj....

Oni asertas, ke la problemoj de la mondlingvo ne solvas teoriaj lingvosciencistoj, sed oni riproacas senprokraste al la Delegacio, ke ĝi neniom gravas, ĉar en ĝi - estis ne nur lingvosciencistoj!....

....
Nome Zamenhof mem estas ligata por kunlaborado kun la franca eldonfirmao Hachette per skriba kontrakto por multe da jaroj kaj li suferus propran finanĉan katastrofon, se li aliĝus al la reformoj. La firmao Hachette estas por francaj esperantistoj minimume tio, kio estas, en malpli granda mezuro, la firmao Kühn por la movado en Bohemio. La devliĝo de Zamenhof reprezentas la sumon de ĉirkaŭ 250 000 frankoj. La reformistoj, por gajni lin, havis kun li en la jaro 1906 sekretan kunvenon ĉe okazo de la Esperanta Kongreso en Genevo. Partoprenis d-ro L.L. Zamenhof, kom. Lemaire, d-ro Javal kaj Leono, frato de Zamenhof. Lemaire kaj Javal proponis al Zamenhof donacon de 250 000 frankoj, por ke li liberigu el kontraktoj kun eldonistoj. Zamenhof principe akceptis la donacon kaj promesis el-labori planon de reformoj. Sed la reformoj fare de li proponitaj estis nur duonecaj kaj ne kontentigis, tial la donaco ne estis al li pagita kaj Zamenhof restis poste plu - fidela esperantisto. Tiu ĉi nuda fakto pravas, ke

1. la reformistoj per siaj reformoj neniel surprizis, des malpli trompis Zamenhofon.
2. ke male, Zamenhof mem kun ili sekrete pri la reformoj mar-candis malantaŭ la dorso de la esperantista mondo trans ka-pojn de konservativuloj kaj sen konsidero pri la lingva komi-tato /tion oni memkomprene nomus eufemisme "natura evoluo"....
3. ke ĉi tie temis pri neniuj "interna ideo", sed pri tute ordi-naraj rondaj francaj luidoroj kaj frankoj....

Tio estas la portreto de Zamenhof, de la sama Zamenhof, kiu poste en la jaro 1907 per incitaĉa cirkulero "Letero al ĉiuj esperantistoj" deklaris kontraŭ la reformistoj perfortan batalon, kiu daŭras ĝis hodiaŭ kaj pri kies rezultoj jam hodiaŭ estas neniuj duboj.

Mi povus per vico da dokumentoj pruvadi, ke pri ĉiuj reformaj intencoj de la Delegacio Zamenhof dekomence detale sciis, ke li esence kun ili konsentis, ke li eĉ la nuna Ido kunlaboris konsile kaj age kaj ke nur lia malstabila karaktero, nekutima batali por progreso pro la progreso mem, la skismon prikulpas.

....
L. de Beaufront agis centfoje pli noble ol Zamenhof. Li arigis la reformojn en konkreta propono, kiun li akceptigis sub la pseudonimo "Ido", kaj neniam li estus malkaŝinta sin mem, dezirante, ke la tuta persona gloro, se oni aprezas ĝin, restu al Zamenhof. Sed Zamenhof, elektante inter la teknika pliperfektigo de Esperanto kaj franĉoj de Hachette, decidigis por la duaj, tial fariĝis necese, solvi la pure teorian problemon per efektiva lukto inter la organizantoj.

František Jiří Chaloupecký

Jen estas fragmentoj el artikolo de J. F. Chaloupecký, kiu respondis al kontraŭ-ida artikolo de d-ro A. Pitlik. La artikolo de Chaloupecký aperis la 3-an de aprilo 1914 en ĉeĥa agzeto "Národní obzor". Chaloupecký plene transprenis la "argumentojn" de idistoj. La artikolon esperantigis A. Staňura kaj ni dankas pro ĝi al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Aldone ni represas ĉi-koncernan leteron de Zamenhof, kies tekston disponigis al ni ankaŭ la IEMW.

Letero de Zamenhof al s-ro Emanuel Kubásek, Plzeň

Kara sinjoro!

Kun danko mi ricevis Vian leteron kun la artikolo de "Národní Obzor" kaj kun via traduko de tiu artikolo.

Kun granda indigno mi legis tiun malhonestan kaj mensogplenan artikolon. Mi hontas nun, ke tiun personon, kiel s-ro Chaloupecký, ni nomis iam nia samideano.

Se li forĵetis Esperanton kaj batalas nun kontraŭ ĝi - tio estas lia afero; sed se por senkreditigi Esperanton li elpensas nun plej senkonscie diversajn mensogojn kontraŭ la aŭtoro de Esperanto kaj presas ilin en gazetoj, - tio estas afero plej malhonesta kaj hontinda.

Mi ne intencas respondi kontraŭ liaj mensogoj, ĉar tio estus tute sencela. Jam de 6 jaroj la idistoj batalas per diversaj mensogoj kaj kalumnioj, kaj se mi respondus kontraŭ unu mensogo, morgaŭ aperus dek novaj.

Kiel estinta kompetentulo en Esperantaj aferoj, s-ro Chaloupecký scias tre bone, ke ĉiuj liaj vortoj estas simplaj mensogoj. Li scias tre bone, ke se min allogus "frankoj" aŭ se mi dezirus fari nelojalajn kontraŭ la Lingva Komitato, mi nun estus tre riĉa homo kaj mi ne bezonus nun akiri miajn vivorimecojn per tuttaga kuracado de malriĉaj malsanuloj.

Defendi min kontraŭ tia malnobla kalumnio mi ne havas la intencon.

Via L. Zamenhof

INTERNACIA LERNEJO POR ESPERANTO-FUNKCIULOJ 1989

Inter la 13-a kaj 15-a de aŭgusto 1989 aranĝis IKKC (Internacia Kultura kaj Kleriga Centro) de Slovacia Esperanto-Asocio Internacian Lernejon por Esperanto-Funkciuloj (ILEF). La aranĝaĵo estis destinita precipe por novaj funkciuloj. Partoprenis ĝin 19 personoj el 5 landoj, el Ĉeĥoslovakio Monika Čerevková kaj Martina Vajdíková, aktivulinoj de Ĉeĥa E-Junularo.

La ĉefaj prelegantoj estis d-ro Arpád Rátkai, vicprezidanto de HEA, kaj ing. Milan Zvara, sekretario de SEA.

La temoj de la prelegoj:

- Graveco de Internacia Kunlaboro en la Esperanto-movado (internacia reciproka informado, specialaj kondiĉoj en socialismaj landoj, konsultigoj de SLEA-j, kunlaboro kun neesperantistaj organizaĵoj - turistoj, naturprotektantoj, sciencistoj ktp.)
- Esperanto-movado kaj pacmovado (historio kaj nuna stato de MEM)
- historio de Esperanto-movado (historio antaŭ UEA, historio kaj nuna stato de UEA, SAT, nuna stato de la E-movado en unuopaj kontinentoj, historio de ĈEA kaj SEA)
- rilato de UEA kaj UN
- kultura apliko de Esperanto (literaturo, eldonejoj, bibliotekoj)
- historio de planlingvoj (problemo de multlingveco en la historio, volapuk, Ido, lingvistika historio de Esperanto)
- studado de fremdaj lingvoj (komparo kun la rezultoj en studado de Esperanto)
- retoriko (preparo de prelego, alparolo, varba kaj solena prelego, gusta prononco - tn. ĉefa kaj flanka akcento en kunmetitaj vortoj, atento de gusta akcento en tradukado de poemoj kaj kantoj).

Krome, s-anino Svetlana Pogorelaja, konata instruistino de Esperanto el Kievo, informis nin pri la nuna stato de la E-movado en Sovetunio. Kaj venis ankaŭ Yoshimi Umeda, eksvicprezidanto de UEA, kiu prezentis al ni diapozitivojn pri la kongresoj de UEA en Brighton kaj en Rotterdam kaj pri konsultigo en Moskvo. Kaj finfine mi devas mencii informojn pri JES (Junaj Esperantistoj en Slovakio), kiujn donis al ni Milan Ivan, la prezidanto de JES.

Kompreneble ni ne nur lernis, sed ankaŭ ekskursis, vizitis multajn belajn lokojn en Tatra-montaro, ludis, kantis, amike babilis, amuzigis. Mi opinias, ke en Poprad ni bone kunigis "la agrablan kun la utila".

(Martina Vajdíková)

INTERNACIA SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO okazos inter la 14-a kaj 20-a de julio 1990. Skribu al: Esperanto societo "Lumo", p.k. 121, 5000 V. Tarnovo, Bulgario.

INTERNACIA TURISMA RENKONTIĜO DE ERMONTARAJ ESPERANTISTOJ - ITREE

Ĉi-jare ITREE okazis en urbeto Boží Dar de la 17a ĝis 23a de septembro. Ĉeestis 22 germanoj, 15 bulgaroj, 10 ĉeĥoj kaj 1 hungaro. Dank'al Esperanto-klubo en Karlovy Vary ĉio estis bonege aranĝita, ankaŭ la vetero favoris nin. La lingva nivelo de la plimulto estis sufiĉe alta, la vesperaj programoj estis amuzaj - ni sentis nin en vere familia rondo. Tial mi volus danki al ĉiuj oferemaj organizintoj de la renkontiĝo por ilia perfekta laboro. (Zýková, Plzeň)

DEKLARO

Ni, esperantistoj, en la tuta mondo jam pli ol cent jarojn uzas la internacian lingvon ESPERANTO, kiu helpas al ĉiuj popoloj plifaciligi la interkomprenigon.

Tiamaniere ni volas helpi ĉe intersanĝado de opinioj, plifaciligi kontaktojn de diverslingve parolantaj homoj kaj tiel disvastigadi la amikecon inter popoloj de la tuta mondo.

Ni scias, ke la unua tasko por ni homoj estas konservi de la vivo sur la planedo TERO,
ni scias, ke estas necese forigi la militojn, kiuj mortigas la senkul-pajn homojn kaj ankaŭ la infanojn,
ni scias, ke estas necese komune klopodi pri la ĝenerala kaj tutmonda senarmiĝo - tio signifas likvidi ĉiujn armilojn - kaj plue komune labori por la nova senarmila mondo,
ni scias, ke la paca kunvivado de la tuta homaro estas ebla - ni tamen estas homoj, kiuj volas vivi en unueco en la mondo de amikeco kaj progreso!
Tial ni volas kaj kompreneble rajtas vivi sen perforto en paco kaj man-en-mane kreadi pli belegan mondon de la estonteco,
tial ni volas PACON!

PACON POR ĈIUJ HOMOJ!

PACON jam hodiaŭ kaj por ĉiam!

Tion atestas niaj subskriboj.

La deklaro estis subskribita de 55 partoprenantoj, kiuj kunvenis dum ITREE en Ermontara urbeto Boží Dar kaj kiuj pritraktis neceson de la paca kunvivado.

La 17-an de septembro 1989

Fervoja fakkunveno en Havířov

Okaze de solenaĵoj de la 20a datreveno de ĈEA en Havířov okazis sabate la 26an de aŭgusto en la Kulturdomo Leoš Janáček fakkunveno de FS de ĈEA. La tempo por okazigi fakkunvenon ne estis konvene elektita. Pro mankoj en informado kaj priservo dum komuna matenmanĝo (pli ol ducent matenmanĝantojn priservis nur du kelnerinoj) la kunveno komencigis malfrue kaj multaj ne sukcesis gustatempe alveni, tial partoprenis nur 28 fervojistoj.

Kiel honoraj gastoj ĉeestis IFEF-prezidanto Joachim Giessner el FRG, ĈEA-prezidanto ing. Petr Chrdle, CSc., kaj reprezentantoj de la kunlaborantaj IFEF-sekcioj el Aŭstrio, GDR, Hungario, Jugoslavio kaj Slovakio.

Post rememoro de la okdekjarigo de la fervojista movado la prezidanto de FS ĈEA Jindřich Tomášek raportis pri la agado de la sekcio de postlasta jarkunveno en Valtice. La membraro iomete kreskis, de 108 al 115 membroj, kreskis ankaŭ nombro de abonantoj de la IFEF-organo "Internacia fervojisto", de 57 al 84. Tradician Printempan Renkonton en Benešov u Prahy la 15an kaj 16an de aprilo 1989 partoprenis 33 personoj. La 41an IFEF-kongreson en Salou (Hispanio) partoprenis 28 anoj el nia lando. Okaze de solenaĵo de 150 jaroj de la fervoja trafiko sur teritorio de Ĉeĥoslovakio aranĝis komune Fervoja kaj Scienc-Teknika sekcioj de ĈEA de la 7a ĝis la 9a de julio 1989 en Strážnice sciencteknikan seminarion SAEST 89, kiun partoprenis 42 fakuloj el 10 landoj kaj oni prezentis 19 prelegojn, kies temoj estis precipe trafiko.

Reprezentantoj de la sekcio partoprenis konferencojn de la kunlaborantaj IFEF-sekcioj en Aŭstrio, GDR, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando.

Pri agado de la nove fondita Fervoja Sekcio de SEA raportis ĝia prezidantino ing. Magdalena Feifířová el Žilina.

Pri la preparlaboroj por la 43a IFEF-kongreso en 1991 en Ĉeĥoslovakio informis ing. Petr Chrdle.

La venonta Printempa Renkonto okazos la 31-an de marto kaj lan de aprilo 1990 en Praha, prizorgos ĝin kunlabore FS ĈEA kaj EK Praha. -JT-

SET LANĈOV

SOMERA ESPERANTO-TENDARO LANĈOV 1989

La pasintjara SET en Lančov estis tre sukcesa. Ĝi okazis en tri etapoj. La 1-an etapon ĉeestis 143 partoprenantoj en 8 kursoj; la plej alta kurso estis C - konversacia. Ĉeestis ĝe-istoj el GDR, FRG, Hungario, USSR kaj Aŭstralio.

En la 2-a etapo estis 140 partoprenantoj en 9 kursoj, el kiuj estis unu kurso D - por instruantoj de Esperanto kaj unu por tradukantoj. El eksterlando estis esperantistoj el GDR, Hungario, USSR kaj Francio. Tri partoprenantoj venis eĉ el Magadan ĉe Oĥotska maro el distanco de 12 mil kilometroj.

En la 3-a etapo estis 156 kursanoj en 11 kursoj, el tio 1 kurso por instruantoj. Eksterlandanoj el GDR, Hungario, USSR kaj Bulgario.

Tre sukcesa estis la ĉi-jara kuirejo estrata de Adolf Tvarůžek. Kuiristinoj estis Marie Štěpniřková, Marie Janová, Jarmila Peřtálová, Věra Kremlářková, Marcela Mařková kaj Josef Mařek. (Laŭ Třebiř-cirkulero 9/89)

HAVÍŘOV Ĉiuj ĈEA-anoj scias, ke la feria sezono 1989 finiĝis per belaj "Festotagoj" omaĝe al la 20-a datreveno de nia Asocio, kiujn aranĝis la Havířov-aj rondetanoj 25. - 28. VIII. 1989. La 7-an de sept, estis organizita kluba kunveno, kiu en tre agrabla etoso pritaksis la sukcese faritan aranĝon. Dum la kunveno estis denove projekciita la ĉeĥa filmo "Esperanto signifas esperon", kiu aperos en ĉiuj ĉeĥaj kinejoj, kaj filmo pri la festo, pretigita fare de laborulo de kulturdomo. La plej grandan meriton pri la aranĝo de la Festotagoj havis la prezidanto Zdeněk Heiser, multege da laboro faris Miloslav Pastrňák kun sia filino Jarmila kaj aliaj klubanoj eĉ klubaninoj. S-ano Jiří Holan faris belajn fotojn.

La 12-an de oktobro ĝisvivis prof. Miloslav Pastrňák la 70-an vivojaron. Okazis festa kunveno omaĝe al tiu psike nemaljuniganta aktivulo, al kiu ni ĉiuj sincere gratulis kaj deziris ankoraŭ multajn vivojarojn en sano kaj bonfarto. Poste rakontis Jiří Holan pri sia vojaĝo en Jugoslavio kaj projekciis belajn diapozitivojn. Ĉeestis ankaŭ lernantoj de instruisto Zdeněk Heiser, kiuj jam trian jaron lernas E-on en lernejoj kromhoraj. La kluba kolektivo kreas tre agrablan medion. **AST.**

OLMOUC Post Seminario en Strážnice vizitis Olomouc gasto el Norvegio s-ro Per Engen, direktoro de Bergena fervojo, akompanita de prezidanto de ĈEA s-ano Ing. Petr Chrdle. Ili estis akceptitaj ĉe direktoro de Střední dráha en Olomouc Ing. Jindřich Zapletal. La traktadoj okazis en Esperanto pri ekologiaj kaj multaj fakaj temoj. La gasto estis akceptita ĉe vicprezidentino de Urba Nacia Komitato Dr. Alena Přihodová. Post trarigardo de urbaj memorindaĵoj li promesis denove viziti Olomouc kaj la preparatan Mondkongreson en Praha 1992.

Malgranda festo okazis en klubejo 8.8.89 okaze de 70-jariĝo de meritplena kluba prezidanto Dr. Vladimír Mohapl, kiu plenumas la funkcion jam de post la jaro 1946, ĉiam ofere, senlace kaj sukcesplene. Li redaktas la kluban "Cirkuleron", daŭrigas kontaktojn kun vasta ĉirkaŭaĵo sed ankaŭ kun eksterlando. Gratulon! Sanon kaj vervon por pluaĵ jaroj!

La kunvenoj de la rondeto okazas ĉiumarde (ne ĉiulunde, kiel estis erare informite en Starto n-ro 3/89).

Kurso de Esperanto por komencantoj estis en Olomouc komencita la 26-an de septembro 1989 per informa prelego pri Esperanto, ĝia uzebleco kaj disvastigo tra la mondo. Al la kurso aligis 37 interesuloj, la kurson gvidas s-ano Ludvík Zaoral. **VL.Blažek**

PARDUBICE La E-rondeto de ZV ROH Tesla havas du murgazetojn en la urbocentro - unu estas en vendejpasejo sur ĉefa strato kaj la dua troviĝas sur la placo en historia kvartalo. Ĉiujare ĉi tie estas spaco por informoj pri malfermo de novaj kursoj por komencantoj, kiuj estas konvene kompletigataj per leteroj, bildkartoj aŭ diversaj donacoj de niaj korespondamiko. Same tiel regule ni preparas murgazeton kun la temo de diversaj Esperantaj agadoj en kuranta jaro. Post la sezono de

renkontiĝoj, kongresoj kaj similaĵ agadoj povas ĉi rigardi fotojn aŭ pluaĵn objektojn el tiuj ĉi aranĝoj. Sed ankaŭ aliaj temoj estas interesaj por neesperantistoj. Tiel ili povas konatigi ekz. kun bildkartoj por Kristnasko aŭ Pasko, kiujn sendas esperantistoj el diversaj landoj de la tuta mondo. Certe ne forgesu ĉe via vizito de la urbo de bona hokeo, ĉevalkonkursoj, kemio kaj marcipano rigardi niajn murgazetojn; vi vidos, ke esperantistoj el Pardubice faras multe por Esperanto. **M.Kajzrlík**



OSTRAVA-VÍTKOVICE En la kadro de la amikecaj rilatoj Ostrava-Volgograd dum du semajnoj en junio 1989 gastis en Ostrava s-anino Valentina Spicínova el Volgogrado. La soveta gasto estas kvina de maldekstre supre, la ceteraj estas membroj de la EK Vítkovice. (La foton faris Dr. Kočvara.)

PLZEŇ La Plzena Esperanto-klubo aranĝis sabate la 16an de septembro aŭtobusan ekskurson al la kasteloj Orlick kaj Zvíkov. Dank' al s-o Vomačka ĉio estis perfekte organizita. La ĉeestantaro estis plene kontenta, ĉiuj - eĉ neesperantistoj, kiuj estis pli multaj ol esperantistoj, deziras similan belan sabaton baldaŭ ripeti. **Zyková**

ZNOJMO EK Znojmo aranĝis en septembro ekspozicion de bildkartoj kaj postmarkoj el la tuta mondo omaĝe al 20-a datreveno de la loka grupo en salonego de Kulturdomo. La ekspozicion vizitis preskaŭ 1500 homoj. Ĝi tre plaĉis al la vizitintoj.

De la 15-a de septembro s-ano Vlad. Rotrekl instruas infanojn en du kursoj. Aligis entute 27 novaj adeptoj de Esperanto. En oktobro li komencis instrui ankaŭ en la kurso por progresintoj, al kiu aligis 11 klubanoj. **VL.Rotrekl**

Niaj sekcioj sin prezentas

NEVIDANTOJ

Nia sekcio estis fondita en la j. 1976 kaj nun kunigas 30 nevidantajn membrojn de ĈEA. Esence ĝi solvas la samajn taskojn, kiujn solvas ankaŭ la ceteraj organoj de la Asocio, sed ĝi faras tion per siaj specifaj rimedoj, koncerne la vidmankon de la membroj.

La ĉefa tasko de la sekcio estas disvastigi Esperanton kaj prizorgi al siaj membroj la Esperantan literaturon en la skribo por nevidantoj (Braĵla skribo).

Ekz. pasintjare estis finita la eldonado de adaptita lernolibro de J. Cink, en monataj daŭrigoj. Preparata estas eldono de Esperanta-ĉeĥa vortaro.

En ĉiuj ĉi problemoj efike helpas nin la Asocio de invalidoj. Ĝi ankaŭ eldonas la Esperantan revuon Aŭroro, kies fervoraj legantoj estas ĉiuj niaj membroj. La revuon abonas 40 niaj legantoj kaj proks. 500 esperantistoj el 50 landoj de la tuta mondo. Eksterlandajn gazetojn ni ricevas aŭ rekte - tiujn, kiuj estas eldonataj en la socialismaj landoj - aŭ ni ricevas jam legitajn ekzemplerojn de samideanoj el okcidentaj landoj. La ekzemplerojn ni sendas unu al alia laŭ precize organizita sistemo, por ke la ekzempleroj plej efike cirkulu.

Sammaniere ni sendas al ni reciproke ankaŭ kasedojn kun surbendigitaj revuoj Monato kaj Esperanto, kaj ankaŭ aliajn sommaterialojn kun E-lingva teksto.

Literaturo en braĵla skribo estas centrigita en la Blindula biblioteko en Krakovská-strato en Prago. En la biblioteko estas Esperanta fako. Librojn povas tie pruntepreni ĉiu nevidanta esperantisto enlanda kaj eksterlanda. Novaj libroj estas aŭ mankopiataj aŭ presataj. Presitajn librojn ni ricevas de tempo al tempo de eksterlandaj esperantistoj.

La jaro 1988 estis por nia sekcio tre sukcesa. La komitato organizis tri aranĝojn:

- la 18-an je junio okazis instruado por progresintaj esperantistoj en Olomouc; la arando havis konversacian karakteron,
- la 10-an de septembro en Prago okazis informkunveno por ĉiuj membroj de la sekcio,
- la 24-an de septembro okazis en Prago instruado por komencantoj, kiuj lernis Esperanton laŭ nove eldonita lernolibro.

Ĉar la ĝisnunaj labormetodoj pruviĝis konvenaj, ni volus simile daŭrigi ankaŭ en tiu ĉi jaro.

Jiří Vychodil,
prezidanto de sekcio de nevidantoj
de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

1990

Enlandaj aranĝoj

9-a Internacia Renkontiĝo de Pacdefendantoj

Aranĝas ZKE Pardubice "Obránci míru" ("Pacdefendantoj")

de la 16-a ĝis la 18-a de marto 1990 en Pardubice

Koresp.adreso: Milada Hemerková, Wolkerova 2071, CS-530 02 Pardubice

Praga Printempa Renkonto APRILO 1990

Aranĝas la fervojistaj sekcioj de ĈEA kaj SEA kaj Esperantista Klubo en Prago ekde la 30-a de marto ĝis la 1-a de aprilo 1990 en Prago
Programo: seminario laŭ la temo: Kiel organizi la vivon de via E-grupo kun kultura programo, amuza vespero en salono de restoracio U Fleků k.a.
Prezo: 190,- Kčs, eksterlandanoj 360,- CSK
Koresp.adreso: Klub esperantistů, p.sch. 1069, CS-111 21 Praha 1

JUSETUR - Junulara Semajnfina Turisma Renkontiĝo

Aranĝas la junulara sekcio de ĈEA de la 24-a ĝis la 27-a de majo 1990 en Prago, por nur 100 homoj. Programo: trarigardo de la urbo, ekskurso al ĉirkaŭaĵo, bivakfajro, ludoj. Eblas prizorgi antaŭ- kaj postrestadon en Prago de la 21-a de majo ĝis la 1-a de junio.
Koresp. adreso: Jindřich Havlík, Plechanovova 363, CS-109 00 Praha 10

Jubilea Renkonto de Handikapuloj

Aranĝas la sekcio de invalidoj de ĈEA

de la 8-a ĝis la 11-a de junio 1990 en Slaný

Koresp. adreso: Josef Vaněček, Soukenická 58, CS-274 01 Slaný

Šumava en selo

Aranĝas klubo Aqualica kaj la junulara sekcio de la 15-a ĝis la 28-a de julio 1990 en praarbaro Boubín (montaro Šumava) - unu semajnon laborbrigado en la arbaro, la duan semajnon biciklado tra la regiono - senpaga restado por 20-30 homoj
Koresp. adreso: Miroslav Tenčí, Všehrdova 6, CS-118 01 Praha 1

Somera Esperanto-Tendaro

Aranĝas klubo Třebíč en 3 etapoj: 1.-14.7., 15.-28.7., 29.7.-11.8.1990 en Lančov - antaŭtagmeze deviga studado de Esperanto, posttagmeze sportoj, ekskursoj, ripozo
Koresp. adreso: Esperanto, p.př. 72, CS-674 01 Třebíč

Internacia Konstrutendaro

Aranĝas la junulara sekcio de ĈEA

de la 12-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1990 en Bedřichov ĉe Liberec, en Jižera montaro, laborbrigado por 20 homoj, pied- kaj busekskursoj, sportludoj ktp.

Koresp. adreso: Petr Šmíd, Kostelecká 1829, CS-547 01 Náchod

Vina Seminario

Arangas la junulara sekcio de ĈEA de la 23-a ĝis la 26-a de aŭgusto 1990 en Strážnice, folkloro centro de suda Moravio - por 80 homoj popularasciencaj prelegoj pri vino kaj pri moravia folkloro, ekskursoj, vizito de karbominejo, vingustumado, amuzvespero en privata vinkelo kun kordcimbala muziko, eblas prizorgi postrestadon en Strážnice kaj en Praha. Koresponda adreso: Petr Bureš, Vítězná 30, CS-696 01 Hodonín 6

IMUR - Internacia Muzika Renkontigo


Arangas la junulara sekcio de ĈEA de la 25-a ĝis la 28-a de oktobro 1990 en Ostrava - por 100 homoj koncertoj kaj prelegoj pri diversaj muzikstiloj, artaj ekspozicioj, ekskurso al skanseno en montaro Beskydy ktp.

Koresp. adreso: Josef Sučík, Masná 9, CS-702 00 Ostrava

Sukcesa JES - Jarneza Esperantista Semajnfino

La Distrikta Estraro Leipzig de GDREA estis invitita esperantistojn el la tuta mondo al la esperantista semajnfino sur la tereno kaj en la Agrikulturo Ekspozicio /AGRA/ de GDR. La preparoj okazis en bonega kunlaboro inter la profesiaj organizantoj de AGRA kaj ties direktoro /transpreninta la patronecon de la renkontigo/ kaj la honoroficaj kunlaborintoj de la Organiza Komitato, konsistanta el esperantistoj. De la 23a ĝis la 25a de junio 1989 kunvenis 250 esperantistoj el 11 landoj. Komune ili travivis solenan aranĝon okaze de la ŝtat-jubileo de GDR kaj honore al la germana heroo Thomas Müntzer. Enkadrite de solenaj Mozart-aj muzikaĵoj, festprelegis kaj deklamis s-rino Wera Blanke kaj la sinjoroj Manfred Arnold kaj Fritz Wollenberg. Okazis ok fakaj prelegoj en Esperanto, el tre vasta temaro, inter alie pri "Nutraĵo el la maro" /Burmeister/Hofmann/, "Bonsai - envazaj miniaturaj pejzaĝoj" /B.Mann/, "Abelbredado kiel mia hobbio" /A.Fichtner/, "Pejzaĝoj post karbominado" /d-ro Werner/, "Redaktado de faka ĵurnalo" /d-ro Hradil/, forstmastrumado /I.Ullrich/, "Vivtenado de la arbaroj" /d-ro Simon/, "Medioprotektado" /R.Schindler/. Ni gvidis la partoprenintojn al diversaj objektoj de la ekspozicio, kaj speciale imprenis multajn la bestoparado. Vespere venkis la societemo. La aranĝo alportis multajn travivaĵojn kaj vekis sufiĉan publikan intereson.

Michael Behr



KORESPOND DEZIROJ ANONCOJ

Mi kolektas purajn poŝtmarkojn tutmonde je temoj: ĉevalo, danco, nudaĵo. Mi sendos mankoliston kaj intersanĝos por niaj aŭ eksterlandaj poŝtmarkoj. Dr. Zdeněk Krupka, Pol. věznů 53, 280 02 Kolín, ĈSSR

43-jara sinjoro intersanĝas bildkartojn kaj interesigas pri literaturo, poezio, sporto, muskolsporto, pezolevado, historio, verkado. Bohumil Horný, Palackého 1513, 753 01 Hranice na Moravě, ĈSSR

49-jara diplomita inĝeniero deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Ivan Petrov, bul. Mogilev 35, ap. 10, 5300 Gabrovo, Bulgario

63-jara esperantisto el GDR volas korespondi kun ĉeĥoslovakaĵa ĝeamikoj. Liaj hobbioj estas fremdaj lingvoj, kolektado de poŝtmarkoj, bildkartoj el ĉiuj landoj kaj moneroj. Walter Steffan, DDR-7050 Leipzig, Bernhardstrasse 10/0401, GDR

22-jara disponistino en vojaĝagentejo deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun leteramikoj el Ĉeĥoslovakio: Christel Willkomm, Richard Lehmann-str. 5, Aschersleben, DDR - 4320

Deziras intersanĝi pm, bk kaj kalendaretojn pri etnologio, folkloro, kostumoj kaj kutimoj Hermann Waltinger, Strasse der AWG 5, Box 7/17, Steudnitz, DDR-6901

22-jara studento volas korespondi kun e-istoj el Ĉeĥoslovakio, kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, kalendaretojn. Corneliu Grigoras, str. 23 August, bl. 103, sc. 2, ap. 12, 2688 Aninoasa, Jud. Hunedoara, Rumanio

23-jara sinjorino laboras kaj studas ĵuron, interesigas pri ĉio: muziko, dancoj, sporto, naturo, vojaĝoj, lernado de fremdaj lingvoj, problemoj de nuna vivo, filozofio ktp. Krom Esperanto ŝi povas skribi angle kaj legi hispane. Inga Kilikevičienė, TSRS, Liet. TSR, Vilnius - 49, 232049, Architektų 98-72 USSR

Du 18-jaraj amikinoj el Litovio volas korespondi kun ĉi. pri ĉi. Audronė Jelvytė, str. Vyšniū 24-19, 235250 Pasvalys, Litovio

Austra Kavaliaušaitė, vilaĝo Gružiai, Poŝto de Gružiai, kolhozo Vlierybe, regiono de Pasvalys, Litovio

36-jara eksedzo, fotisto, interesigas pri studado de lingvoj, kolektas poŝtmarkojn kaj monerojn, skribas ankaŭ ĉeĥ- kaj slovakingve. Vadim Iljin, 187020, A/k n 103, Tosno, Leningrada regiono, USSR

30 geknaboj el Britio volas korespondi. Skribu al: Jack Gray, 64, Taverners, RD. Gillingham, Kent n E 8 9 an Great Britain

29-jara komencanto deziras korespondi kun ĉiuj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio. Li kolektas fotografiaĵojn kaj bildkartojn, interesigas pri sporto kaj muziko. Darcy Gomes da Silva, Quadra 06 Casa 03 Setor Oeste Gama, Brasilia D. F.

15-jara esperantistino interesigas pri turismo, muziko, kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn, volas korespondi kun ĝesperantistoj el Kanado, Germanio, Francio, Usono, Brazilo, Britio, Hispanio, Italujo, Bulgario, Aŭstralio, Ĉinio, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio, Japanio. Edyta Martyn, Ul. XXX-lecia PRL nr. 39, 63-900 Rawicz, Pollando

17-jarulo interesigas pri muziko, kolektas poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. Krzysztof Pkociennik, ul. Roosevelta 76/5, 64-920 Piła, Pollando

18-jara lernanto interesigas pri sporto, literaturo kaj vojaĝoj, kolektas poŝtmarkojn. Kazimierz Tadeusz Mironowicz, str. Długa 59, PL-42-500 Będzin, Poll.

24-jara inĝeniero interesigas pri elektroniko (komputiloj IBM PC XT/AT), turismo, vojaĝoj, naturo, ekologio. Rafał Stanek, os. Wysokie 4/42, 31818 Krakow,

Izraelaj naĝantoj en Ĉeĥoslovakio

Je la honoro de 70 jaroj de organizata naĝesporto en Ĉeĥoslovakujo okazis en Bratislava la 2-an kaj 3-an de septembro 1989 la dua Naĝveteraniado de Slovaka Socialisma Respubliko. En la ĉampioneco partoprenis pli ol 180 naĝantoj de 3 kontinentoj: Eŭropo (ĈSSR, Aŭstrio, Hungario), Ameriko (Kanado) kaj Azio (Israelo). El Israelo estis en Bratislava veteranaĵ naĝantoj de estinta fama naĝklubo Bar-Koch-Ba Bratislava. La klubo Bar-Koch-Ba Bratislava en la tempo de unua respubliko vicigis al la plej bonaj naĝkluboj en la centra Eŭropo. La veteranaĵ naĝantoj de Israelo atingis en Bratislava en pli aĝaj grupoj bonajn rezultojn.

En la dua naĝveteraniado de SSR partoprenis ankaŭ samideano Ing. Jaroslav Liška (Bohemians Praha), kiu gajnis en sia naĝgrupo (65 ĝis 69 jaroj) bonajn rezultojn. 5-an Ing. J. Liška startis sepfoje: li gajnis tre bonajn rezultojn en 100m rampnaĝo (1:33,2), en 400 m rampnaĝo (7:45,5), en 50 m rampnaĝo (0:40,4) kaj en 200 m miksnago (4:05,9).

LĜ

Sukcesa kuranto

La prezidanto de la fervojista sekcio de ĈEA s-ano Jindřich Tomášek estas aktiva maraton-kuranto. Li partoprenis ankaŭ la kros-kuron al Dreiländereck (1509 m) en Aŭstrio. Inter kelkaj dekoj da kurantoj el Jugoslavio, Italio, Aŭstrio kaj FRG li atingis en kategorio AK3 (super 45 jaroj) belan 4-an lokon. (Informace ĈES 5/89)

el la sekretariejo

La 1-an de aŭgusto 1989 ekfunkciis en la oficejo de ĈEA nova funkciulo - nome la oficejestro. La funkcion plenumas samideano Ing. Zdeněk Pluhař, konata el la fama movada agado (origina profesio: kemiisto). Li estas plene okupata en la asocio, kio certe bone influos glatan funkciadon de la oficejo.

Redaktora pardonpeto.

En la 4-a n-ro de Starto 1989 sur la p. 29 aperis jenaj eraroj, kiujn bv. korekti: 3a linio de supre: anst. aperte devas esti aparte
9a linio de supre: anst. legonta devas esti leganta
15a linio de supre: devas esti: sed mi ne trovis.
Dankon al la aŭtorino de la teksto.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 Prago 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafika arango), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (respondeca redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas Podnik služeb města Liberce. Transdonita al presejo 1989-11-15. Jarabono 36 ĈSK, por eksterlando 48 ĈSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafická úprava), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3.1985. Tiskne Podnik služeb města Liberce. Předáno do tisku 15.11.1989. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovní povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.



...el Pollando

Lernantino de la 7-a klaso kolektas ludilojn, pupojn, ursetojn, volus pli bone koni batalojn de Malproksima Oriento, Karolina Roszak, Cychlin 13/4, 63-324 Kuczkow, woj. Kalisz, Pollando

24-jara studento de matematiko, fraŭlo, interesigas pri baroka muziko, aparte de J. S. Bach; ludas gitaron; interesigas pri matematiko, t.n. literaturo S-F (scienc-fikcia), t.n. Shatsiu - ĉina popola medicino; sporto; aktuala grafikarto kaj grafiko. Janusz Porębny, Al.Niepodległości 9/6, PL-35-303 Rzeszów, Pollando

22-jara studento interesigas pri turismo, literaturo, biologio, sporto, muziko. Jarek Wyrozębski, Urocz 1/29, 11-400 Kętrzyn, Pollando

21-jara medicinistino interesigas pri turismo, sporto, vojaĝoj kaj literaturo. Anna Łyczkowska, ul. 17 Stycznia 125, 64-400 Międzychód, Pollando

21-jara denaska invalido, vojaĝanta sur veturilo, kolektas poŝtmarkojn, vidkartojn kaj gramofondiskojn. Henryk Gruska, 43-210 Kobiór, ul. Centralna 141, Poll.

13-jara lernantino de la 7-a klaso interesigas pri sporto, kolektas poŝtmarkojn kaj tre satas legi librojn de Curwood, Verne, Szklarski. Paulina Tomaszewska, Sobotka 23, 63-450 Sobotka, woj. kaliskie, Pollando

13-jara lernantino de la 7-a klaso serĉas korespondantojn en Ĉeĥoslovakio. Agnieszka Symoniak, 63-450 Sobotka, Sobotka 86/7, woj. kaliskie, Pollando

Instruisto pri fiziko interesigas pri turismo, literaturo kaj ludas gitaron, kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Andrzej Hawrylewicz, 59-800 Luban, Koscielnik 40 a, Pollando



Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979

[Faint handwritten notes and signatures]